87/2. 16,- Ft

HUNGARA VIVO

MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN



FARIĜU ANKAŬ VI
NIA KOMERCA PARTNERO!



La plej granda komerca entrepreno de Transdanubio

NIA VARLISTO:

— Dommastrumaj kaj kuirejaj aparatoj
— Laboriloj, malgrandaj maŝinoj
— Ĝardenaj aparatoj
— Hejtaj kaj kuiraj aparatoj
— Artikoloj por instalado de banĉambroj
— Aparatoj de telekomunikado
— Elektraj dommastrumaj maŝinoj
— Bicikloj, motocikloj

FERROVILL

Komerca Entrepreno
H-9021 GYŐR
Gorkij u. 21.
Telefono: 16-022
Telekso: 024241

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXVIIa jaro 1987 n-ro 2
(132)

ENHAVO

Jubilea intervjuo kun la hungara ministro pri eksteraj rilatoj (*Imre Szenes*) 42
Princz O.: Sojle de la centjariĝo 46
Ertl, I.: Post la inkuba kubo: magio-manio 48
Glatz, F.: Vojoj novaj kaj malnovaj (*V. Benczik*) ... 50
Bessenyei, T.: Lajos Bíró en Novgvineo 53
Fejes, M.: Kompara analizo de tri tradukoj el „La Tragedio de l' Homo" 54
Nemere, I.: Mato 58
Panoramo 60
Fenyvesi E.: Revuo de revuoj
Intervjuo kun la redaktoro de „Juna Amiko" 64
Karen, J.: Regimento da zorgoj aperis surhorizonte 67
Bálint, Sz.: Erara konekto 68
Kock, E. de: La konflikto de epokoj 70
Rákos, S.: Ludoj de Catullus (*Imre Szabó*) 71
Benedek, M.: La donaco de la horloĝisto 72
Unu poemo — en du tradukoj 74
Librovendado 75
Recenzoj 76
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo ... 78
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 79
Korespondi deziras, Leterkesto 80

Sur la frontpaĝo: la fortikaĵo de Buda — nokte. (Foto de Z. Fejér)

Saluton al la Kongreso...

de la hungaraj esperantistoj, kiu okazas inter 20-22 de marto en Budapeŝto: HV volas partopreni en la grava manifesto per frutempa apero kaj enhavo inda al la evento.

La plej grava ero de tiu ĉi numero sendube estas la intervjuo, kiun donis al nia revuo d-ro Péter *Várkonyi*, hungara ministro pri eksteraj rilatoj.

Malgraŭ la rezervoj, kiujn li havas koncerne la tujan enkondukeblecon de Esperanto, videble li estas konvinkita pri la valoroj kaj utileco de Esperanto. Liaj vortoj bele demonstras la subtenon, kiun Esperanto havas en Hungario flanke de la ŝtataj organoj.

Certe la plej fama hungaro en la mondo nuntempe estas Ernő *Rubik*, la inventinto de la „magia kubo", kiu konkeris centmilionojn da homoj. Nun li aperas kun nova inventaĵo, kies unuaj vendostatistikoj promesas ne malpli furoran sukceson.

Apartan atenton meritas la artikolo de la hungara historiisto Ferenc *Glatz*, kiu ekzamenas laŭ tre interesa maniero la formiĝon de la nuna imago pri socialismo. La dua parto de lia artikolo aperos en nia sekva numero.

Márton Fejes faras interesan komparon inter tri tradukoj de la hungara ĉefverko „La Tragedio de l' Homo", István *Nemere* denove aperas kun novelo, ĉifoje sciencfikcia, kiun certe akceptos ĝoje la multnombraj ŝatantoj de liaj verkoj.

Iom amplekse ni konigas la situacion de la tre grava revuo „Juna Amiko", kiu antaŭ kelka tempo ricevis novan redaktoron, la konatan nov-zelandan esperantiston Stefan *MacGill*. Estus tre bele, se en la Jubilea Jaro „Juna Amiko" povus okupi sian indan lokon en la esperantista komunumo, kontribuante al la lingva edukado de novaj Esperanto-parolantoj.

La pasintjara statistiko pri la librovendado de HEA pruvas, ke la esperantistaro rilatas ame al sia kulturo, tamen kelkaj valoraj libroj vendiĝis en iom hontinde malgranda kvanto.

Tiun ĉi numeron ricevas senpage ĉiuj partoprenantoj de la Hungara Esperanto-Kongreso — ni esperas, ke multaj el ili baldaŭ fariĝos niaj abonantoj...

Jubilea intervjuo kun d-ro Péter Várkonyi

La hungara ministro de eksteraj rilatoj pri la demandoj de la internacia komunikado

Multaj historiaj faktoj kaj analizoj pruvas, ke la lingvaj problemoj ĉiam kaj ĉie havas ankaŭ sociajn kaj politikajn radikojn. Tial same la ekzisto de la internacia lingvo havas ankaŭ socian kaj politikan signifon. Eĉ tiam, se la ŝtataj kaj internaciaj forumoj de la granda politiko ĝis nun tute ne donis tian oficialan atenton al tiu ĉi specifa fenomeno, kian ĝi fakte meritus. Estas vere, ke jam multaj ŝtatviroj kaj aitrangaj politikistoj elpaŝis publike por la afero de la Internacia Lingvo, kaj la subtenajn deklarojn plurfoje sekvis eĉ institucia apogo kaj en Hungario, kaj en aliaj landoj. Nun, en la Jubilea Jaro „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo) kaj Hungara Vivo kune petis intervjuon de d-ro Péter Vákonyi, hungara ministro pri eksteraj rilatoj.

Kamarado ministro, vi bezonas intertrakti kun multaj eksterlandaj partneroj. Kiel vi travivas la malfacilaĵojn lingvajn de la internacia komunikado, la pezigan efikon de la interpretado dum la intertraktoj, kaj la okazajn mistradukojn, kiam vi ne povas uzi iun el la de vi parolataj fremdaj lingvoj?

Tiaj situacioj ne faciligas la laboron de la politikistoj kaj diplomatoj — komencis sian respondon d-ro Várkonyi. — Ja kaj en la diplomatiaj intertraktoj, kaj en la formulado de la dokumentoj havas gravan rolon la precizaj difinoj, la nuancita kaj nemiskomprenebla envortigo de la detaloj, kio eĉ en la gepatra lingvo ofte estas tasko ne facila. Kaj en la kazoj, kiam sinkrona interpretado ne estas certigebla, la tempo de la intertraktoj duobliĝas. Kaj kiam ni povas intertrakti kun niaj partneroj senpere, sen interpretisto, tiam estas pli bonŝance, se la uzata peranta lingvo estas lernita lingvo por ambaŭ flankoj. Sed kiam ni uzas la lingvon de la eksterlanda partnero, ĉar ĝi estas t.n. mondlingvo, tiam nia partnero necese havas certan lingvan avantaĝon kompare al ni. Tiu ĉi neevitebla situacio rezultas el tio, ke praktike sur ĉiuj kampoj de la internaciaj kontaktoj fariĝis oficialaj interlingvoj la lingvoj de landoj kun grandnombra loĝantaro aŭ parolataj de pluraj landoj. La historio elformis la kutimon, ke la alilingvaj popoloj devas adaptiĝi al tiu ĉi fakto.

Multaj akceptas la lingvajn privilegiojn kaj malegalecon, kvazaŭ tiuj sekvus el historia leĝo. Kiel vi opinias pri la mala pinio de la internacia Esperanto-movado, laŭ kiu la natura multlingveco de la homaro — kun ties konservado, kaj certigo de egalrajteco por la naciaj lingvoj — estus plej racie kaj demokratie transpontebla per la mondskala instruado de neŭtrala internacia helplingvo, kaj ĝia enkonduko en ĉiujn sferojn de la internacia vivo?

Mi konas ĉi tiun starpunkton de la internacia Esperanto-movado, kiu fakte esprimas ĝiajn perspektivajn celojn. Mi scias, ke multaj homoj simpatias al tiu ĉi ideo, interalie ankaŭ mi mem. Via movado havas la senduban avantaĝon, ke ĝiaj reprezentantoj — sendepende de la perspektivaj celoj — jam nun povas utiligi Esperanton en sia propra vivo. Certe per tio estas klarigebla la fakto, ke en la mondo multaj milionoj lernas aŭ parolas Esperanton. Kaj multnombraj, interalie ankaŭ hungaroj, havas vastan korespondadon kun esperantistoj en socialismaj kaj aliaj landoj de la kvin kontentoj. Pere de tiaj internaciaj amikecoj, reciprokaj vizitoj la esperantistoj evidente povas konstrui pli intimajn kontaktojn kun la loĝantoj de aliaj landoj. Tiel ili povas vidi certe pli multe el la vivo kaj la kulturaj valoraĵoj de aliaj landoj, ol la kutimaj turistoj. Per tio via movado tre praktike akcelas la interkompreniĝon, proksimiĝon kaj pacan kunvivadon de la popoloj.

Mi kredas, ke Esperanto estas esence ia moderna latino, kiu laŭ mia scio havas riĉan tradukliteraturon kaj evoluantan originalan beletron. Per ĝia riĉiĝanta faka lingvo jam okazas sciencaj konferencoj

kaj interŝanĝoj de spertoj. Ĉion ĉi mi scias parte de mia iama kolego, Imre *Kutas*, kiu estis nia ambasadoro en Francio kaj Turkio: li estis aktiva esperantisto, kaj post sia emeritiĝo longtempe li funkciis kiel ĝenerala sekretario de HEA.

La rezultoj de via movado ĝojigas min, precipe tio, ke en nia lando Esperanto estas lernebla kiel fakultativa studobjekto kaj en la ĝeneralaj, kaj en la mezlernejoj. Tio utilas ankaŭ pro la fakto, ke tiuj, kiuj ellernis Esperanton, pli facile povas alproprigi la rusan, anglan, francan, aŭ la lingvon de iu ajn alia popolo.

La kono de la supraj lingvoj estas tre grava por nia lando, ĉar niaj vastiĝantaj internaciaj kontaktoj ekonomiaj, turismaj kaj kulturaj bezonas multajn kvalifikitajn laborantojn, diplomitajn fakulojn, kiuj parolas sur utiligebla nivelo la t.n. mondlingvojn. La tiusenca antaŭprepara rolo de Esperanto estas do speciale valora. Ne malpli gravas ankaŭ tio, ke la partoprenantoj de la Esperanto-movado laŭ internaciisma pensmaniero povas prijuĝi la malfacilajn problemojn de la homaro, la monda politiko kaj de la batalo por la paco.

Kio koncernas la ĉefajn perspektivajn celojn de la internacia Esperanto-movado, ties atingebleco por multaj el ni ŝajnas tre malproksima, aŭ nobla utopio. Ja la homaro devas superregi ankoraŭ multajn esence pli gravajn tutglobajn problemojn, antaŭ ĉio ĝi devas forigi la minacon de la nuklea milito. Tial, surbaze de la realaĵoj de la nuna mondo, estas kompreneble, ke la registaroj dediĉas malmultan atenton al la solvado de la lingvaj problemoj de la internacia komunikado per maniero diferenca disde la ĝisnuna.

Ni ĝojas, ke vi taksas pozitive la jamajn, nuntempajn avantaĝojn de la Internacia Lingvo.

La faktojn oni devas rekoni. Kompreneble estus necese, ke pli multaj ol ĝis nun rekonu ankaŭ la utilecon de la lernado de la internacie aktuale pli utilaj mondlingvoj, kaj ili faru fortostreĉojn por alproprigi ilin. Kaj tiuj plenkreskuloj, kiuj jam ne entreprenas la taskon ellerni iun mondlingvon, ellernu almenaŭ la pli facilan Esperanton.

Lige kun tio mi volus reveni al via multrilate reala konstato pri la perspektivaj celoj de la Esperanto-movado, ĉar tio estas alirebla ankaŭ alimaniere. La mondo vivas en procezo de ampleksiĝanta internaciiĝo. Tial estus tre grave, ke ankaŭ la centmilionaj amasoj de la diverslingvanoj havu eblon por la senpera interkompreniĝo. Sed la granda plimulto de la homoj neniam kapablos plene ellerni eĉ nur unu malfacilan nacian lingvon, ĉar oni havos por tio nek tempon, nek eblojn. Tiel ankaŭ la baroj de la komunikado estas tutgloba problemo, kaj ili havas striktajn interrilatojn kun aliaj tutglobaj problemoj. La rekono de tio ĵetus realan prilumon al la pliiĝo de la lingvaj malfacilaĵoj en la internacia komunikado, kaj tiel same ankaŭ al la streboj de nia movado, ja ankaŭ al ili rilatas la vortoj de Aurelio Peccei, fondinto kaj eksprezidanto de la Roma Klubo, troveblaj en lia libro „La estonto — en niaj manoj": „En la nuna stato de la aferoj nur tiu estas rigardebla vera realisto, kiu ne timas la utopion. Tio, kion oni nomas realpolitiko, jam delonge perdis sian ekzistorajton: nun ni bezonas novan realutopion." El tia vidpunkto ŝajnas tute motivite lanĉi la demandon, ĉu ne estas jam tempo, ke la registaroj fine komencu okupiĝi pri la lingvaj demandoj de la internacia komunikado laŭ nova maniero?

La menciitajn lingvajn problemojn oni povus ekirigi al ia solvo nur sur internacia kampo, kaj mi devas memorigi pri tio, ke eĉ la nunaj, mondpolitike plej gravaj intertraktoj kiel malrapide, peze, kun kontraŭdiroj progresetas, foje eĉ okazas retropaŝoj, ili marŝas kun konstantaj stumbloj. Ties kaŭzoj estas vaste konataj. La jam atingitaj rezultoj, kiel la Fina Akto de Helsinki, aŭ laste la rezolucioj de la Konferenco de Stokholmo estis maturigitaj per laborado dum multaj jaroj aŭ monatoj, kaj koste de reciprokaj kompromisoj.

Inter tiaj cirkonstancoj eĉ tio estas demando, kiu lando iniciatu la intertraktojn cele al la solvo de la internaciaj lingvaj problemoj? Tio apenaŭ estas atendebla de landoj, kies lingvo estas t.n. mondlingvo, kvankam eĉ tiaj landoj rigardas malsimpatie al la nuna superrega pozicio de la angla lingvo. Tiam do kiuj povus

D-ro Péter Várkonyi (maldekstre) akceptas sian bulgaran kolegon Petar Mladenov en la Budapeŝta flughaveno

iniciati el la landoj, kies lingvo ne havas tian pozicion? Kaj en kia formo, en kia forumo, kun kia propono por solvo? Ĉar la plej multaj registaroj, eĉ multaj lingvistoj malhavas sufiĉajn konojn pri Esperanto. Pri tio kulpas ankaŭ via movado, pro la manko de konvena propagando. Certe oni povas kulpigi ankaŭ la lingvosciencajn institutojn, ĉar ĝis nun ili apenaŭ turnis la necesan atenton al la senantaŭjuĝa scienca pritaksado de Esperanto. Ja ĝuste ili povus liveri al la registaroj la plej kompetentajn informojn.

Tiu via konstato estas esenca kaj grava. Ĉar signifa nombro da lingvistoj en multaj landoj, interalie ankaŭ pluraj hungaraj lingvosciencistoj, individue jam alvenis al la objektiva scienca pritakso de Esperanto, kaj ili jam verkis grandnombrajn studojn pri la temo, elpaŝante por la afero de Esperanto.

Certe ankaŭ ili havis gravan rolon en tio, ke la temo pri Esperanto jam en 1920 atingis eniri la tagordon de la Ligo de Nacioj. Dek kvar registaroj tiam faris la proponon, ke oni enkonduku la instruadon de Esperanto en la lernejojn. Tiu fakto estas rigardebla kiel grava atingaĵo de via movado. Eĉ tiam, se la iniciato de tiuj registaroj estis frua, ĉar la tiamaj brita kaj franca registaroj, defendante la privilegiojn de siaj lingvoj, malhelpis fari esencan kaj pozitivan decidon. Mi supozas, ke tiu iniciato de 1920 por via movado havas valoron de grava precedenco. Kvankam la konsisto de UN grave diferencas disde tiu de la Ligo de Nacioj, laŭ mi la cirkonstancoj eĉ nun ne estas maturaj por ripeti tiaspecan iniciaton.

En nia tempo ankaŭ tio estas grava rezulto, ke la Ĝenerala Kunveno de UNESKO eĉ dufoje akceptis rezolucion, kiu donas gravan moralan subtenon por la disvastigo de la Internacia Lingvo. La lasta rezolucio, tiu de 1985 — kiu evidente aperis en via revuo — naskiĝis ĝuste en la signo de via Jubilea Jaro por rekoni la meritojn de la lingvo kaj instigi ĝian disvastigon: nia registaro estis unu el la prezentantoj de la rezolucipropono. La hungaraj esperantistoj povas utiligi ankaŭ tiun fakton por la ampleksigo de sia movado.

Lige kun via bonintenca kaj objektiva prijuĝo de la nuna situacio kaj viaj ĵusaj demandoj mi volus memorigi, ke kamarado István Sarlós, kiu en 1983 kiel vic-ĉefministro estis prezidanto de la Honora Komitato de la 68a UK, en sia intervjuo, donita al „Világ és Nyelv", diris, ke se la registaro „ricevos pripensitan, respondecan proponon aŭ peton de iu ajn kompetenta esperantista forumo pri tio, kion necesus fari koncerne tiun ĉi aferon, tiu propono aŭ peto estos certe plej bonintence konsiderata. Ja nenio principe malhelpas, ke la hungara registaro faru eventualajn paŝojn aŭ iniciatojn koncerne tiun ĉi temon." Lige kun tio mi demandas: ĉu en la nomo de la registaro vi povas konfirmi tiun ĉi starpunkton? Kaj se jes, ĉu la gvidantoj de HEA povus antaŭ la formulado de tiusencaj proponoj antaŭe konsulti vin pri principaj demandoj?

Kiel mi jam diris, ankaŭ nia registaro subtenis la lastan UNESKO-rezolucion. Okaze de eventualaj proponoj de HEA nenio malhelpas fari antaŭan konsultadon, sed en tio necesos ankaŭ la partopreno de la kompetentuloj de la Ministerio pri Klerigo.

La afero de la Internacia Lingvo havas bazan idean parencecon kun ĉiuj progresemaj manifestiĝoj de la internaciismo, tiel ankaŭ kun la socialisma internaciismo. Ĉu vi vidas eblon por tio, ke surbaze de bone pripensitaj proponoj de HEA, aprobitaj ankaŭ de la hungara registaro, la kompetentaj politikistoj de Hungario komencu konsultiĝon kun la samnivelaj gvidantoj de la aliaj socialismaj landoj pri la lingvaj problemoj de la internaciaj rilatoj, kaj kompreneble pri tio, kiel doni pli seriozan interŝtatan subtenon al Esperanto, proponanta la eblon de solvo de la koncernaj problemoj?

Principe tio eblas. Speciale tiam, se ankaŭ niaj partneroj en aliaj socialismaj landoj rigardus la situacion matura por tia konsultiĝo. Siavice tio dependas ankaŭ de la Esperanto-asocioj de la ceteraj socialismaj landoj, ĉu ili kapablas konvinki sian registaron pri la graveco de tia konsultiĝo, kaj pri la realeco de paŝo antaŭen?! Ĉar se jes, tiam la eventuala iniciato de nia registaro renkontus favoran akcepton. Do, tiu

Leo Tindemans, belga ministro pri eksteraj rilatoj, kaj d-ro Péter Vaŕkonyi

afero bezonas ankoraŭ seriozan maturigadon. Precipe el tiu vidpunkto, ke en la kazo, se ni jam interkonsentis kun niaj amikoj, estus necese inicia-ti intertraktojn ankaŭ kun aliaj interesitaj landoj...

Por plupensi la eblajn agojn cele al la atingo de tiu ĉi perspektivo, mi volus citi konstaton el la studo „Notoj pri la lingva planado kaj lingvopolitiko" de la hungara lingvisto György Szépe: „La lingvopolitikon de la Eŭropaj landoj difinas tendencoj konkurantaj inter si aŭ rekte kontraŭaj." Tio parte estas natura afero pro la diferencaj historiaj kaj sociaj cirkonstancoj de la koncernaj landoj. Samtempe la lingvaj problemoj de la internacia komunikado tuŝas ilin ĉiujn. Pro tio, ĉu ne estus utile, se nia lando, kune kun la reprezentantoj de kelkaj aliaj socialismaj kaj kapitalismaj landoj iniciatus la kreon de internacia lingvopolitika komisiono aŭ laborgrupo en la Postkonferenco de Vieno? Tion jam proponis hungara intelektula grupo al la hungara registara delegitaro de la Eŭropa Kultura Forumo, okazinta en Budapeŝto, sed tiu propono pro certaj tiamaj cirkonstancoj ne povis estis prezentita al la forumo.

La eblon krei lingvopolitikan komisionon estus necese studi kune kun niaj kulturpolitikistoj. Surbaze de tio ni povus konsideri, ĉu montriĝus eblo por tiaspeca konsultiĝo? Se jes, kaj se la laboro de tia komisiono promesus sukceson, oni povus prezenti tian inicia-ton, se ne al la nun okazanta Postkonferenco de Vieno, sed al la sekva simila postkonferenco. Tamen estas pripensinde, ĉu ni limigu la aferon al Eŭropo? Laŭ mi oni devus inviti al la lingvopolitika komisiono ankaŭ la reprezentantojn de la evolulandoj. Ja la lingvopolitika problemo multrilate povus kunligiĝi kun iliaj propraj iniciatoj kaj strebadoj por nova komunikada ordo.

Ĉio ĉi estas nur ebloj, kiujn ankoraŭ devus konsideri ankaŭ la politikistoj de la landoj, montrantaj intereson pri la afero, por ellabori komunajn alternativojn de agado.

Kiel vi opinias pri la sekvaj ebloj: ni supozu, ke kreiĝus internacia lingvopolitika komisiono, kies proponojn kelkaj registaroj prezentus al la Ĝenerala Asembleo de UN. La esenco de iliaj proponoj estus tio, ke cele al la plifaciligo de la internacia komunikado la ŝtatoj-membroj interkonsentu pri tio, ke en la lernejoj de la mondo fariĝu deviga unusola lingvo, por post certa tempo enkonduki ĝin per internaciaj kontraktoj en ĉiujn sferojn de la internacia vivo. La elekton de tiu unusola lingvo oni proponus laŭ la subaj alternativoj:

a.) La registaroj konsideru, ĉu ili akceptus kiel unusolan perantan lingvon de la homaro la lingvon de iu alia nacio, konsciante, ke tiamaniere ili donas al la koncerna nacio gravajn kulturajn privilegiojn?

b.) La registaroj konsideru, ĉu ili akceptus kiel internacian lingvon neŭtralan, de ĉiu homo facile lerneblan vivantan lingvon, kiel estas Esperanto, kiu apartenas al neniu popolo, sed estus komuna spirita trezoro de la tuta homaro?

Tiun specialan demandon mi faras parte por demonstri: ĉefe per tia alternativo estus celkonvene aliri la eblon de la transpontado de la multlingveco en la mondo; parte por demandi: vi mem kiun alternativon proponus al nia registaro, kaj kian argumentadon vi uzus?

Laŭ miaj konoj eĉ la lanĉo de tiu demando renkontus nesupereblajn barojn en la nuna situacio. Mi ne kontestas, ke la universala enkonduko de neŭtrala internacia lingvo kaj ĝia aplikado sur ĉiuj kampoj de la internacia vivo povus krei la kondiĉojn de la komunikada kaj kultura egalrajteco, kaj povus malfermi novajn perspektivojn por la paca ekonomia, socia kaj kultura kunlaborado de la popoloj. Sed permesu ankaŭ al mi fari demandon. Kial postrestis la Esperanto-movado disde la scienca-teknika revolucio, okazanta en la mondo? Antaŭ kelka tempo mi legis Usonan studon pri la tendencoj de la evoluo, en kiu la aŭtoro aplombe asertas, ke la du devigaj lingvoj de la sekva jarcento estos la angla kaj *basic*. Ĉe la kreo de la komputila lingvo Esperanto eĉ ne venis en konsideron. Tion mi rigardas kiel preterlasitan eblon, sed eventuale ankoraŭ ne estas malfrue, ke vi turnu vin al tiu ĉi eblo.

Koncerne la demandon, ke iam ni atingu la eblon prezenti al UN tian alternativon, laŭ mia opinio necesos ankoraŭ multaj movadaj, sociaj kaj politikaj fortostreĉoj. Antaŭ ĉio necesos, ke la mondo alvenu ĝis la kontrolata malarmado, ke ni liberiĝu disde la minaco de la nuklea kataklismo, kaj sekve de tio ankaŭ disde la ekonomiaj zorgoj, kiuj premas la pli grandan parton de la mondo. Por tio, ke la mondo iam havu vere universalan mondlingvon — la lingvo mem jam estas je nia dispono. Nun jam necesus „nur" universala garantio por tio, ke la mondo ne pereos; kaj nia Tero, kiel komuna kaj speciala „kosmoŝipo" de la homaro pace povu daŭrigi sian giradon ĉirkaŭ la Suno. Sendube, ankaŭ la Esperanto-movado estas aktiva kaj nobla partoprenanto en la batalo por tiusenca transformado de nia globo.

Fine, okaze de la centjara jubileo de Esperanto mi demandas vin, kian mesaĝon vi sendas al la partoprenantoj de la hungara Esperanto-movado kaj al la vastiĝanta tendaro de la simpatiantoj en la spirito de la supraj pensoj kaj de la UNESKO-rezolucio, subtenita ankaŭ de la hungara registaro?

Respekte mi salutas la enlandan kaj internacian tendaron de la Esperanto-movado. Mi deziras, ke en la dua centjaro pliaj milionoj ellernu la Internacian Lingvon, kaj ili ĉiuj fariĝu aktivaj batalantoj de la nobla afero. Kaj la naciajn organizaĵojn ĉirkaŭu pliaj dekmilionoj da simpatiantoj.

Kamarado ministro, dankon pro la intervjuo.

Imre *Szenes*

Oszkár Princz sekretario de HEA

Sojle de la centjariĝo

La jaro 1987 estas por ni esperantistoj mejloŝtono. Ĉi tiu cent jara datreveno instigas nin trarigardi, kaj retaksi la historiajn atingojn de Esperanto.

Cent jaroj nur por la unuopulo estas longa tempo, sed estas kvazaŭ momento en la historio de iuj naciaj lingvoj, inter kiuj kelkaj havas eĉ 30-50 oble pli longan historion ol Esperanto. Lingvoj aperis kaj malaperis dum la historio, same kiel la peraj lingvoj, trapasante vojon kiel planedo la orbiton de la leviĝo tra la zenito ĝis la malapero. Kie movas sin Esperanto sur la orbito? Objektive respondi ĉi tiun grandan demandon ni povas - laŭ mia opinio - nur post la aparta esploro de la situacio de la landaj movadoj, al tiu esploro mi intencas kontribui per kelkaj pensoj.

La hungara Esperanto-movado kaj ĝia asocio en la hungara socio estas bone integrita. La politikaj, ŝtataj kaj sociaj instancoj respektas ĝin kaj diversgrade kontribuas al la efektivigo de ĝia celo.

En Hungario oni povas lerni Esperanton en oficialigitaj kadroj en multaj lernejoj. Laŭ la instrukcio nro 104/1980 de la Ministerio pri Edukado en bazlernejoj de la 3-a klaso la gelernantoj povas elekti Esperanton kiel duan fremdan lingvon. Saman eblon donas la instukcio n-ro 123/1981 de Kleriga Ministerio por gimnazioj de la 3-a klaso: Esperanto estas inter tiuj studobjektoj el kiuj la gelernantoj devas elekti unu, kaj post la elekto ĝi farigas devige lernenda studobjekto. En altlernejoj kaj universitatoj de 1986 la gestudentoj laŭ la aperinta instrukcio 13/1985 (M.K. X. 23. MM), devas lerni du fremdajn lingvojn. La dua estas elektebla, kaj ankaŭ inter tiuj estas la lingvo Esperanto.

En la Scienca Universitato Eötvös Loránd jam de dudek jaroj funkcias Esperanto-fako, kie studis jam preskaŭ cent gestudentoj, rajtigitaj instrui Esperanton en ĉiuj niveloj kaj kadroj en Hungario.

Estas sciate, ke pluraj obstakloj ekzistas, kiuj malhelpas la lernadon de Esperanto eĉ tie kie estas oficialaj kadroj. Ke nur la plej gravajn mi menciu, kie ne estas instruisto, tie oni certe ne povas lerni la lingvon. Ĝuste pro tio en pedagogiaj altlernejoj kaj universitatoj la novan ŝancon kiun donis la instrukcio n-ro 13/1985, ni eluzu: ni koncentru niajn organizajn fortojn ekfunkciigi la instruadon de Esperanto en altlernejoj kaj universitatoj por ke post kelkaj jaroj multobliĝu la nombro de insrurajtaj kaj kapablaj homoj. Sed samtempe ni ne forgesu pri la jam ekzistantaj istruistoj, ekzemple pri la jam preskaŭ cent gestudentoj, kiuj finis Esperanto-fakon. Ili ĉiuj estas rajtigitaj instrui Esperanton, malgraŭ tio nur en apenaŭ 20 mezlernejoj oni instruas Esperanton. En la registro de Instrua Komisiono de HEA estas pli ol 500 instruistoj kaj instruantoj, kaj el inter ili nur triono instruas la lingvon.

La alia grava tereno de la oficialigo de Esperanto estas la ŝtata lingvoekzameno. Esperanto estas ankaŭ tie tute samrajta, kaj per ĝia diplomo oni povas ricevi kromsalajrojn pro lingvoscio en tiuj laborejoj, kie oni uzas Esperanton.

Ĉi tiu lasta frazo tuŝas la plej malfortan ĉeneron de nia movado, nome la utilon de la lingvo. Ni propagandas la lingvon kaj la movadon, oni povas aĉeti lernolibrojn, povas lerni sola, koresponde, en kursoj, en lernejoj. La socio laŭ ĝia merito agnoskas la movadon: kie oni uzas la internacian lingvon, tie eĉ kromsalajro estas pagata.

En la historio de la homaro ni vidas, ke ideoj disvolviĝas relative rapide nur pere de revolucioj. Sed esperantistoj ne estas revoluciemaj, ne volas uzi iu ajn perforton kontraŭ la aliopiniuloj. Sekve por ni restas nur la reformoj, do paŝoj post paŝoj.

Ni esperantistoj estas konvinkitaj pri la granda avantaĝo de ĝenerala uzo de Esperanto, kaj ni miras ke tion la homoj

kaj precipe la deciduloj ne rekonas. Sed nia miro ne havas realan bazon, ja la vivo estas plena de malracio. En la nunaj jaroj ĉefe en la urboj la loĝantaro sufokiĝas pro la fumo de fabrikoj kaj de tiu de la aŭtoj. Jam de longe oni prilaboris la kontraŭaĵojn de la fumo: en la fumtubon oni muntus filtrilojn, se tio ne estus multekosta; anstataŭ benzino oni uzus alkoholon aŭ diversajn gasojn, sed ankaŭ tio estus multekosta. Sed la sano de la homo ĝenerale kaj precipe la futuro de la homaro ne tiel gravas.

La unuopuloj plej parte same agas: okupiĝas pri tio kio kontentigas unue ilian „bazan" kaj poste la tn. „altnivelajn" bezonojn, en nia kazo ĝenerale tiuj lernas Esperanton, kiuj povas uzi ĝin, kaj ĉefe tiuj aliĝas al la asocio kies bazajn bezonojn ĝi povas kontentigi.

Kompreneble mi ne volas konkludi, ke ni ne kredu je la ŝanĝebleco de la mallongtempa pensmaniero, nur mi opinias, ke ĝenerale la homaro solvas tiujn taskojn, kiuj jam ne estas prokrasteblaj. Videblas, ke ankoraŭ al tiuj ne apartenas la lingvaj malfacilaĵoj de la internacia komunikado.

Malgraŭ tio dum la lastaj jaroj konstateble fortiĝas ankaŭ la mondskala, globala pensmaniero, kaj en ĉi tiu tendenco ankaŭ la adeptoj kaj disvastigantoj de la ideo de la internacia lingvo povas trovi lokon por si.

Se la propagando kaj informado vekas intereson pri la lingvo Esperanto kaj pri la movado, sed se ili ne povas kontentigi la bazajn bezonojn la „konvinkitoj" tiuj foriros. Kompreneble ĉar ekzistas ankaŭ la „altnivelaj" bezonoj ĉiam estas esperantistoj kiuj inklinas labori kaj „batali" por la venko de Esperanto.

Ankaŭ en la publika opinio vivas la volo solvi la lingvajn problemojn. La plimulto apogas la aplikadon de iu(j) nacia(j) lingvo(j). Ni kredu ke la popoloj ne forgesas pri la historia sperto: fremda lingvo ĉiam kunefikas kun la kultura kaj ekonomia influo, kaj la nun vivantaj nacioj ne volas perei kiel jam multaj en la historio. Ankaŭ tion ni kredas, ke la internacia lingvo devas esti pli facile lernebla ol la naciaj lingvoj, ke ne nur la elito, la talentuloj, sed ankaŭ la malpli kapablaj kaj malpli multe da tempo havantaj homoj povu ellerni la senesceptan, logikan, pli facilan internacian lingvon.

Ĉe ĉi tiu temo ni ne povas forgesi pri la solvo promesita de la nova tekniko, nome la komputiloj. Ĉu tio estos la solvo kion ofte priskribas la sciencfikciaj romanoj: per tradukmaŝinetoj oni povas paroli senpere kaj senĝene? Verŝajne la maŝino ĉiam nur faciligas la laboron de la homo sed tute ne povos anstataŭi ĝin.

Kontribui al la plenumo de la konceptitaj taskoj, la estraro de HEA celas koncentri la forton de la movado kaj asocio al la jenaj terenoj: propagando — instruado — aplikado.

Kaj ene de ĉi tiu triopo ni celas koncentri niajn fortojn al la instuado de Esperanto kaj poste la aplikado, kaj ene de aplikado ŝanĝi la ĝisnunan praktikon: anstataŭ la aplikado de Esperanto dum la libera tempo, apliki la lingvon en la laborejoj.

La aplikado de Esperanto en la laborejoj povas fortigi la plej malfortan ĉeneron de nia movado. La laborejoj - de la turismaj, komercaj oficejoj tra la fabrikoj ĝis la agrikulturo - havas monon por instrui Esperanton, presi librojn kaj revuojn, dungi tradukistojn, do apliki ankaŭ Esperanton, se tio servas ilian celon, se la uzo de la internacia lingvo donos profiton.

Por ĉi tiu celo ĝis nun ni ne uzis niajn eblojn. En Hungario la malplimulto de Esperantogrupoj funkcias en laborejoj, malgraŭ tio, ke la avantaĝo de la laborejaj grupoj estas evidenta. Ekzemple la entrepreno MÁV (Hungara Fervojo) donas plenan moralan, teknikan kaj eĉ malavaran financan helpon al la Fervojista Faksekcio de HEA; en la horara libro de pluraj jaroj estas ankaŭ esperantlingva parto, la grupoj senpage - kiel la aliaj laborejaj grupoj - uzas la kulturajn havaĵojn de la entrepreno.

Same estas ĉe la poŝtistoj kvankam nur kvalite, ĉar inter ili nur malmultaj estas esperantistoj.

La plej dinamika evoluo estas videbla ĉe la kooperativoj, el kiuj kelkaj eĉ fariĝis juraj membroj de HEA, ankaŭ finance apogante la movadon.

Kompreneble ankaŭ pri la laboreja - faka, socia, kultura, sporta, libertempa k.a. - aplikado ni ofte aŭdas la ŝlosilan vorton de la fari ne volantoj: kial uzus mia laborejo Esperanton, se por siaj gi celoj ne trovas partnerojn pere de Esperanto?

La menciitaj ekzemploj montras, ke laborejoj multloke pretas investi monon ankaŭ por la futuro, kompreneble ne sen racio kaj limo. En la komenca periodo esperantistoj serĉu la kontaktojn kun esperantistoj de la partnerlaborejoj kaj instigu siajn respondeculojn ke en la partnerlaborejaj kontaktoj ankaŭ ili komencu uzi Esperanton. Post la ambaŭflanka uzo certe fariĝos pli facila la vojo al la aplikado de Esperanto.

POST LA INKUBA KUBO: MAGIO-MANIO

Antaŭ kelkaj monatoj mi kompilis kvizon pri Hungario por eksterlandanoj. Multe mi cerbumis: kiajn faktojn, kiujn nomojn enmeti por ne malkuraĝigi kaj samtempe klerigi la solvantojn? Pri unu nomo mi estis certa: pri tiu de Ernő Rubik.

Tiu ĉi inĝeniero — li naskiĝis en 1944 — mondfamiĝis per inventaĵo, kiu eble simbolos nian epokon por la posteuloj tiel, kiel por ni piramido la antikvan Egiption, ostraĥono (voĉdona tegoleto) la klasikan Atenon. Sed plie ol ili, la magia kubo, disvastiĝinta tutmonde en ne malpli ol 100.000.000 da ekzempleroj, estas universala modelo sur pluraj niveloj. Ĝi modelas kiel prezentiĝas problemoj: jen simpla geometria formo (nur la sfero estas pli perfekta en sia simpleco, tiel metaforante jam por Ksenofano el Kolofono Dion, dum la inkuba kubo por multaj sensukcesaj solvantoj certe simbolas la diablon), kies ses identaj facoj, ĉiuj alikoloraj, montras harmonion, ordon. Sed nur post kelkaj turnoj — ĉar la 26 kubetoj, kiuj konsistigas la kubon (la 27-a situas centre), turneblas naŭope, tridirekte — estiĝas haoso. Ni provas hazardajn returnojn, fidante je nia bonŝanco. Ni rapide komprenas, ke helpas nek hazardo, nek perforto (ni ja povus dismarteli kaj kunglui la kubon); ni devas konsekvence finpensi la ŝtupojn de la problemaro kaj agi trankvile, science.

Ĉu ne tiel devus solviĝi ĉiuj problemoj de la ĥaosa mondo, inkluzive la vetarmadon? La mondo ja similas al konfuza magia kubo, kiun samtempe turnadas pluraj senkonkordaj ludantoj, kiuj ne povas aŭ volas vidi la kubon en sia tuto, sed tenace insistas pri kelkaj, ŝajne reordigitaj najbaraj kubetoj, kiuj konsekvencigas malordon sur aliaj facoj de la kubo.

La kubo simbolas ankaŭ la fizikan mondon mem, laŭ la esprimo de hungara atomsciencisto, György Marx, „ĝi estas la plej malgranda ne-triviala modelo de la granda universo". El inter la 43 252 003 274 489 856 000 eblaj statoj de la kubo nur unu koincidas kun la komenca fazo, kun la stato de perfekta ordo. Same laŭ aktualaj mondmodeloj la universo evoluas de komenca stato al ĉiam pli granda entropio (tendenca egaliĝo de varmokvantoj, t. e. de energio). Konceptoj kiel la dua leĝo de la termodinamiko (la ne-returnebleco de certaj fizikaj procezoj) estas ilustreblaj per la kubo.

Sed kiel eblas, ke „la ludilo de la jarcento", „la enigmo de enigmoj", pri kiu Usona matematikisto Solomon Golomb konstatis: „Einstein diris, ke li ne kredas, ke Dio ludas per kuboj. Eble li malpravis. Dio verŝajne turnadas magian kubon.". Kiel eblas do, ke ĝi alprenis ankoraŭan simbolan funkcion, tiun de la fiasko, atentigante pri la kontraŭdiroj kaj mankoj de fabrikado kaj komerco en Hungario? Somere de 1982 bankrotis Budapeŝta kooperativo, kies fabrikaĵo, la kubo de Rubik, jam savis de simila sorto la grandan Usonan entreprenon Ideal Toys. Simptome estas, ke András Mezei, poeto kaj publicisto, verkis tutan libron pri la ekonomia-organiza fono de la „kubofero" kun la titolo „Hungara kubo — Ĉu ni estas tiel riĉaj?". (Flanka aspekto: en Hungario eblas akiri sukceson, eĉ profit(eg)on per verkado pri malsukcesoj; libro de Antal Végh pri nia lasta „nacia katastrofo", la fiasko de la nacia futbalteamo en Meksikio, vendiĝis — laŭ onidiro — en 700.000

Rubik kun sia nova inventaĵo



ekzempleroj. Kristnaske aperis jam nova libro pri la temo, verkita de Mezei...)

La interesiĝema leganto povas sekvi la meandroriĉan vojon de la kubo: de la ideo ĝis la monda sukceso, tra la labirintoj de la hungara burokratismo. Rubik ekpensis pri la kubo en 1974, kaj patentigis la priskribon de la „enspaca logika ludilo" en 1975. La fabrikado en Hungario komenciĝis en 1977, alportante unue malgrandajn, poste furorajn vendajn sukcesojn. La unuaj paŝoj de internacia konatigo ŝuldiĝas al la brita matematikisto David Singmaster, sed komerce al du hungardevenaj, eksterlandaj negocistoj, kiuj fine kontaktigis la fabrikantan kooperativon Politechnika kun la Usona Ideal Toys. En 1979 la koncerna komerca entrepreno, KONSUMEX kontraktis por sensacia ludil-eksporto: unu miliono da magiaj kuboj! Post kelka tempo ne malpli ol 800.000 fuŝkuboj estis resenditaj de Usono, pro nekontentiga kvalito. Intertempe, vidante ŝancegon, ekaktivis Tajvanaj kaj aliaj orientaziaj fabrikantoj por inundi la avidan tutmondan konsumantaron: ne eblis defendi la fabrikrajtojn kontraŭ ili, ĉar mankis internacia patento por la kubo (simple ĉar antaŭe neniu emis prunti monon al Rubik por plilongigi ĝin).

La neeviteble alfrontinda konkludo de la „kub-afero" estas: rekoni la eblojn — ĉu sciencajn, ĉu ekonomiajn — de neniam renkontita ideo estas malfacile en ĉiu ajn socia medio, (ĉar la homa vivo mem preferas alkutimiĝon, ŝablonigintajn reagojn al problemoj), sed sistemo, kiu ne povas rapide, elaste adaptiĝi al novaj bezonoj, devas rezigni sian propran perfektiĝon. Unue, la hungaraj instancoj ne antaŭvidis la sukceson de la nekutima ludilo, poste, la hungaraj produktantoj ne povis kvante kaj kvalite kontentigi la mondan merkaton. (Gyula Nemcsók, estro de Politechnika: „En nia ekonomia sistemo ne eblas fari miraklon. Kiam ni sendis la mendojn al la presejo, al la ŝraŭbo- kaj risortofabrikoj, ili ĉiuj respondis, ke ni hazarde skribis pli da nuloj al la fino de la ciferoj. Ili ne povis liveri tiel grandan kvanton.")

Sekve, la profito plejparte riĉigis ne nian landon, sed pli reagopretajn orientaziajn, Usonajn firmaojn. Kurioza formo de la t.n. „brain drain" (cerbosorbo): eĉ se la inventinto, la ideo mem kaj — parte — la realigo restas en Hungario (tio ne ĉiam okazis, se pensi pri pluraj hungardevenaj sciencistoj, — Leó Szilárd, Denis Gábor, John Neumann kaj aliaj —, kiuj famiĝis aŭ eĉ Nobelpremiiĝis alilande), la profito de mensa laboro, kiu ja devus esti plej signifa en materiale malriĉa lando, forfluas per eviteblaj kanaloj.

Espereble la aktuala Rubiksensacio estos tio ankaŭ en ekonomia senco. Temas pri la „magiaj kvadratoj", nomataj angle *„Rubik's magic"*, do „Rubika magio". Kompare kun la kubo, „magio" unue ŝajnas infanludilo: el la inĝenie interligitaj plastikkvadratoj elformiĝas jen dometo, jen tendo, jen skatolo... sed la tasko estas reaperigi tri ringojn, kies arkopartoj troviĝas senesperige dise sur la kvadratoj.

Dank' al la kubo, Rubik fariĝis milionulo, kio ebligis al li establi fonduson por junaj inĝenieroj kaj artistoj kaj krei la „Rubik-studion", realiganton de siaj — kaj alies — novaj planoj. En tiu studio estas fabrikataj la kvadratoj por Hungario kaj por la socialismaj landoj (tiutempe, magiaj kuboj alvenis Moskvon, Pragon, Sofion preskaŭ nur en turistaj valizoj). Por aliaj merkatoj produktas la Usona firmao *Matchbox*, kiu aĉetis februare de 1986 la fabrikan kaj vendan licencojn; do, la hungara ŝtato enspezas por ĉiu Rubik-ludilo vendita. La surmerkatigo komenciĝis septembre de 1986, kaj dum tri monatoj forvendiĝis 10 milionoj da „Rubikaj magioj" (kompare, la unua jaro de la kubo rezultigis nur unu milionon kaj duonon da aĉetoj). Komence de januaro de 1987 Rubik anoncis en Tokia preskonferenco (kiun, cetere, ĉeestis pli da ĵurnalistoj ol ian ajn hungaran aranĝon antaŭe), ke en Japanio, kie nun ŝajnas furori „magio-manio", disvendiĝis dum nuraj 25 tagoj 700 miloj da ludiloj, kvankam ili kostas tie proks. 12 dolarojn. Nemirinde, ĉar la japana publiko estis jam laŭplane „antaŭpreparita": en vaste spektita televida felietono videblis novembre infaneto, kiu, kvazaŭ hazarde, ludis per „Rubika magio"...

Rubik promesas baldaŭan aperon de novaj membroj el la kubofamilio. Ĉu ni devus pripensi malfermon de konstanta Rubik-rubriko?

István *Ertl*

Sándor Petőfi: JOHANO LA BRAVA. Popolfabelo en versoj. Kvara eldono. El la hungara tradukis: Kálmán Kalocsay. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 21 cm, 60 p. Prezo: 12,- ned. gld. (Por Hungario: 50,- Ft)

Tiu ĉi klasika verko de la hungara literaturo en la admirinda traduko de Kalocsay jam famiĝis en Esperantujo. Konatiĝu ankaŭ vi kun la naive ensorĉaj aventuroj de la hungara kampulido, kiu fine retrovas sian mortintan amatinon en Felando!

Ferenc Glatz

Vojoj novaj kaj malnovaj

Neniam dum la 20a jarcento la imago pri ni en eksterlando estis tiel favora, kiel nuntempe — diras la kolegoj historiistoj ĉi tie en Londono, je pli ol dumil kilometroj okcidente de Budapeŝto. Ili parolas pri la dua „ora periodo" de Hungario dum la Nova Epoko. La unua estis dum la jaroj 1870-1900, kiam en Hungario firmiĝis kaj riĉiĝis la burĝa klaso, estis konstruataj urboj, vojoj, fervojoj, kaj la lando proksimiĝis al la Eŭropa nivelo. Nuntempe — la kolegoj diras — Hungario esence likvidis la mankojn sur la kampo de la kontentigo de la personaj bezonaĵoj, ordinare karakterizajn por la socialismaj landoj. Okazas senprecedence rapida bonstatiĝo de la civitanoj: la nuna generacio konstruas pli da loĝdomoj, ol pli frue du-tri generacioj. Libera sabato, rapidega kresko de la nombro de privataj aŭtomobiloj, gulaŝaj-vinaj semajnfinoj. Miaj britaj kolegoj asertas: en Hungario oni povas bone vivi. La politika gvidado estas aplomba: oni vidas ĝin tia kaj el oriento, kaj el okcidento; ĝi havas krome unu eksterordinare talentan politikan personecon, kiu estas la plej sukcesa hungara politikisto dum laNova Epoko. — Ĉio ĉi estas la postsekvo de la *sesdekaj* jaroj — opinias la kolegoj. Pripensige.

Kiel hungara civitano, volonte mi aŭdas ĉion ĉi. Sed antaŭ mia forveturo el Budapeŝto miajn orelojn trafis vortoj alitonaj, ofte amaraj. Ĉu nur tial, ĉar ni estas plendema popolo? Intelektuloj kaj meznivelaj gvidantoj amare diras: riĉiĝanta sortimento de varoj, kompreneblaj prezaltigoj, nekomprenebla politiko koncerne la personajn enspezojn. Akademiano baldaŭ emeritiĝonta povas aĉeti du virajn kostumojn per sia monatsalajro, laŭ kiu oni kalkulos lian pension; la monon por la ceteraj necesaĵoj li devus akiri per kromlaboro, sed la senpoveco kaj la specifa „propra politiko" de la ministerio pri financoj generas neelteneblajn streĉitecojn. Nia akademiano pagas imposton laŭ 80% de la honorarioj, ricevitaj por sciencpopularigaj prelegoj, nur 20% restas senimpostaj; kaj samtempe por la plej aĉkvalitaj varoj kaj servoj li devas pagi egajn sumojn al personoj laborantaj en la privata sektoro — senfakture, kaj tial senimposte por la ricevantoj. Laboristoj, simplaj homoj, miaj najbaroj nur mansvingas: — Oni parolas pri la neceso fari diferencojn inter la salajroj laŭ la kvanto kaj kvalito de la farita laboro, sed en ĉiu ŝtata laborloko regas salajra egalismo. Se kelkaj homoj pli strebemaj fondas privatan entrepreneton, ili ne multe prosperas per tio: la ekonomia politiko de la lando donas ĉiujn favorojn al la grandaj entreprenoj, eĉ se tiuj fabrikas la produktojn je plurobla prezo — sole nur ĉar tiuj estas „ŝtataj". (Konstrulaboristo, muntisto, eldoneja redaktoro — ĉiuj senescepte parolas kontraŭ la megalomanio.) Ili rekonas la onidiran kontinuecon de la evoluo, sed rimarkas, ke la „unueco" jam estas tiel ĝenerala inter ni, ke estus bone scii, kiu konkrete kiel opinias pri la ekonomiaj „reguliloj", kaj entute, kion ni volas atingi? Malcerteco, neplenumitaj decidoj, kaj dume koruptado, misuzo de la oficaj eblecoj. Pluraj homoj eĉ rekonas, ke ankaŭ ili vivas el tio, sed ili sentas honton. — En la sesdekaj jaroj, turnas la temon miaj kunparolantoj al la historio, tiam ĉio ŝajnis tiel firma.

Jes, karaj kolegoj-historiistoj: ankaŭ tio estas Hungario.

„Tiuj sesdekaj jaroj!" Turnas sin tiel scivole socio, sentanta sian krizon, al la demando: „kiel ni alvenis ĉi tien?". Kaj ĝi faras ankaŭ la demandojn, „kial ni atingis ĉi tion?" kaj „kial nur ĉi tion ni atingis?" La demandojn oni faras al si mem, kaj al ni, historiistoj. Ni nur grumblas: estas politika lukso, ke nia historiografio pri la ĵusaj jardekoj tiel malfortas. Nur la historiografio pri la industrio kaj agrikulturo povas prezenti seriozajn rezultojn.

Ĉi tie en Londono mi havas tempon por fari notojn, trafoliumi librojn, kaj restrukturigi faktojn kaj nur parte konatajn aferojn.

UNUA NOTKAJERO
Hezitoj kaj malinklinoj, 1953-1968

En Hungario iom post iom disvolviĝas la praktiko verki Hungari-centrisme pri la historio de la lastaj jardekoj. Kvankam ni scias bone: ĉio, kio okazas en Hungario, okazas inter *striktaj politikaj kadroj*, inter tiuj de la komunumo de la „popoldemokratiaj landoj". Tiuj kadroj kreiĝis en la jaroj 1948-49, ili estis naskitaj de la Stalina respondo al la internacia politika situacio, difinita de la malvarma milito. Poste ili firmiĝis kaj restis. Iliaj ĉefaj karakterizaĵoj estas koneblaj el la faka literaturo: preteco por atako, kio en la ekstera politiko signifas izoliĝon disde la kapitalisma mondo, en la interna politiko firman politikan disciplinon, serĉadon de la aliancoj de internaj la ekstera malamiko, t.e. la serĉadon de perfiduloj. Intensa evoluigo de la armeo. La ampleksigo de la rajtoj de la policaj kaj sekurecaj organoj al granda parto de la privata vivo de la civitanoj: centra kontrolado kaj limigo de la vojaĝoj al eksterlando, subpremo de la kritiko, kiel faktoro povanta kaŭzi internan malfortiĝon. En la ekonomia politiko: absoluta prefero de la peza industrio kaj energio-industrio, necesaj por la aŭtarcia evoluo, malprefero al la pretendoj de la individuaj konsumantoj; en la agrikulturo: perforta

prefero de la granduzino en ĉiuj branĉoj de la produktado. En la socipolitiko: egalismaj idealoj, subtaksado de la rolo de la intelektularo en la nomo de la granduzinaj laboristoj, subpremo de la privata produktosfero (metiistoj, etproduktistoj-kamparanoj). En la ŝtata organizado: centrigo, donanta la kredon de sekureco, kredo en tio, ke per la helpo de la ŝtato (t.e. alŝtatigo de ĉio) estas solveblaj la sociaj streĉitecoj. Tiun ĉi ŝtatorganizan principon grandega agitanta aparato konkretigas en la praktiko per amaso da malkaraj broŝuroj, per miloj da ideologiaj kursoj: oni ĉizas ĝin en la cerbojn kiel la *socialismon de la 20a jarcento.* (Treege mankas kompara historio de la popoldemokratioj. Ĝi povus demonstri, ke en la diversaj landoj per la samaj — aŭ sur kelkaj terenoj malsamaj — metodoj okazas la realigo de la sistemo. Kaj ankaŭ tion, laŭ kiel diferenca ritmo okazas la reformado de la sistemo...)

Iom post iom en Hungario estas akceptita afero paroli pri la „kvindekaj jaroj", kaj aparte pri la „sesdekaj". Sed post relego de la elnotitaj eventoj, leĝoj, paroladoj de politikistoj, tuj surprize klare evidentiĝas: *ekde 1953 ĝis nun ni vivas la epokon de la hezitado kaj malinklinado koncerne la malkonstruon de la Stalina modelo de socialismo, kaj koncerne la reformon.*

1953-1958. La 5an de marto 1953 mortas Stalin. Ĉe la potencoŝanĝo venkas la reforma linio, ĉekape kun N. S. Ĥruŝĉov. Detaloj ĝis nun ne estas konataj. Ĉu ĝi havis sisteman reformprogramon, validan por la tuto de la reĝimo? Ĉiukaze en la sfero de la potenco la intenco de ŝanĝoj estas radikala. En la 20a kongreso, fine de februaro 1956 *venkas la Ĥruŝĉova linio.* Ankaŭ la tiutempa gazetaro klare pruvas la intencon malkovri la kontraŭleĝan misuzon de la potenco; komenciĝas la malkonstruado de la militista ŝtatorganiza principo, pli da atento al la realaĵoj de la kapitalisma mondo, rekono de la rajto de la popoldemokratioj elekti propran vojon. La aparato kontraŭstaras, ĝi defendas ne nur siajn privilegiojn, sed ankaŭ la propran imagon pri socialismo, la proprajn idealojn. (Historie tio estas klarigebla, „honesta" ago. Sed la historia pritakso estas alia afero.) Dum ĉe la konstruado de la sistemo estis okulfrapaj la sameco de metodoj kaj la sama ritmo en la diversaj popoldemokratiaj landoj, ĉe la malkonstruado de la Stalinaj ŝtatorganizaj principoj oni spertas malsamajn ritmojn kaj vojojn. En Pollando printempe de 1956, post purigaj diskutoj interne de la partio, venkas la reformo, oni rehonorigas („rehabilitas") la viktimojn de la senleĝaj persekutoj, entute dudek mil homojn. Somere laborista ribelo en Poznań, kiu rezultigas la forigon de la malnova ordo.En Ĉeĥoslovakio silento. En Bulgario kaj Rumanio same. Laŭŝajne ankaŭ en Hungario...

Iom koncize *pri la eventoj en Hungario.* En la partio tuj post la morto de Stalin, somere de 1953, venkas la reforma linio. En la junia kunsido de la Centra Gvidantaro de la partio: temporezista kritiko pri la personkulto. Sed jam montras la komenciĝon de la hezitado, ke oni ne publikigas la tekston de la rezolucio, „por ŝirmi la aŭtoritaton" de la partio. (La unuan fojon ĝi aperas nur aprile de 1986, en unu el la teoriaj revuoj de la partio.) *La hezitado kaj malinklinemo disvolviĝas.* Marte de 1955 Rákosi kaj lia stalinisma grupo reakiras siajn pli fruajn poziciojn en la partio. Rákosi klopodas prisilenti la kontraŭ-stalinisman glacirompiĝon en la 20a kongreso de la soveta partio. Sed en julio — verŝajne ankaŭ laŭ soveta iniciato — en la sama tago kunsidas la CK en Varsovio kaj Budapeŝto. En Varsovio oni rehonorigas W. Gomulka-n, kiu estis flankenigita en 1949. En Budapeŝto la CK eksigas Rákosi-n (18a de julio). Sed la stalinisma linio linio estas ankoraŭ forta: oni elektas unua sekretario Gerő-n, kiu estis dum la personkulto unu el la ĉefaj helpantoj de Rákosi. Sed apud li jam elektiĝas kiel unu el la sekretarioj de la CK János Kádár, pasiginta dum la personkulto jarojn en malliberejo, kaj fariĝis membro de la Politburoo ankaŭ György Marosán, iama maldekstra socialdemokrato, kiu ankaŭ gastis en la malliberejoj de Rákosi. La julia rezolucio estas la elirpunkto de la eksvingiĝanta reformpolitiko. (Necesus ekzameni: dum la hezitado kia estis la rilato inter la konkretaj ekonomipolitikaj, ŝtatpolitikaj, partipolitikaj, kaj la socipolitikaj problemoj. Ni scias: la reforma linio deziras la preferadon de la agrikulturo, malpligon de la grandindustriaj investoj, la ampleksigon de la industriaj branĉoj, kiuj servas rekte la konsumadon, ktp. Jam tiam estis okulfrapa afero: la vastaj amasoj de la socio vidas malmulte el la diskutoj interne de la partio, la politika instituciaro kaj la tezoj de la agitado restas senŝanĝaj.) La 23-an de oktobro 1956 eksplodas armita ribelo: pro ĝi respondecas unuavice la dogmismo, kiu montris nenian komprenon pri la neceso de la reformoj. Tio donis eblecon por la politika elpaŝo de fortoj kontraŭ-popoldemokratiaj. (Estas tre instrua la pritakso de la nuna pola historiografio pri la Pollandaj eventoj en 1956.)

La politika *konsolidiĝo* en 1957 ekas *en la signo de firma reformpolitiko.* Niaj fontoj estas gazetartikoloj kaj paroladoj de politikistoj. Ili validigas en la ekonomia reformo la spiriton de la rezolucioj de la Centra Gvidantaro de la partio junie de 1953 kaj julie de 1956. Necesas atentigi pri la tutlanda konferenco de la Hungara Socialisma Laborista Partio, dum kiu János Kádár baze pridiskutis la dogmemajn tezojn de József Révai, publikigitajn ankaŭ en „Népszabadság", la centra organo de la partio. — Sed dum la aŭtunaj eventoj de 1956 multaj el la adeptoj e la reformo en la armita-politika konflikto agadis en la kontraŭsoveta aŭ kontraŭpartia tendaro. La fortoekvilibron de la hungara konsolidiĝo, la demandon „konsolidiĝon, sed kun kiu?" denove decide influas la internaciaj rilatoj. (Sen internacia komparo ne eblas klare vidi la efektivan pezon de la diversaj mondekonomiaj kaj internapolitikaj fortoj en la konsolidiĝo hungara post 1956, ĉeĥoslovaka

oni tuŝas la potenc-mekanismon de la Stalina sistemo, nepre rezultigas la elpaŝon de kontraŭrevoluciaj fortoj kaj aperon de kontraŭsovetaj tendencoj. La batalo inter la linioj de Maŭ kaj Ĥruŝĉov fariĝas ĉiam pli forta, sed publika ĝi fariĝas nur ekde junio de 1960 (artikolo en „Pravda" kontraŭ la KP de Ĉinio), kaj precipe en oktobro de 1961.

La *aktiveco* de Ĉinio koncerne la „hungaran problemon" estas dekomence forta. En januaro de 1957 en Moskvo okazas kun la partopreno de Ĝoŭ Enlaj soveta-ĉina-hungara intertraktado pri Hungario, poste Ĝoŭ Enlaj vizitas Budapeŝton. La hungara partia kaj registara delegitaro, vizitinte Moskvon, tuj faras amikan viziton al Ĉinio. Pri la eksterordinara grandeco de la ĉina monhelpo, precipe pri tiu en dolaroj, oni ĉie babilas. Aprilo de 1958: komerca kontrakto por longa periodo inter Ĉinio kaj Hungario, kaj fine (1959) kontrakto pri amikeco. Pri la internacia pozicio de la konsolidiĝo, gvidata de János Kádár, montriĝas la jena bildo: en unu flanko Ĉinio, kun palpebla subteno, en la alia flanko — en la okcidentaj landoj — plena rifuzo de la konsolidiĝo. La pluaj vojaĝoj de la hungara partia kaj registara delegitaro celas Rumanion, kaj en februaro de 1958 Jugoslavion. Dum tiu ĉi periodo — inter la 6a de februaro kaj 17a de junio 1958 — okazas la proceso kontraŭ Imre Nagy (ĉefministro dum la armita ribelo) kaj liaj kvin kunuloj. La jugoslava registaro sendas protestan noton al Hungario pro la proceso kontraŭ Imre Nagy. La respondo: rifuzo. Ĝis 1958 la plimulto la „antaŭ-oktobraj" reformemuloj — sendepende de tio, ĉu ili partoprenis en perarmilaj aktivecoj — fariĝis „ne-salonkapabla". La *hungara konsolidiĝo* „nature" havas *koalician karakteron.* Tion oni komprenu tiel, ke dum la jaroj de la firmiĝo, inter 1958-61 fortiĝis la pozicioj de la adeptoj de la malnova imago pri socialismo. (Temo por disertaĵo: ekzameno de la listo de mezaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj. Kiuj „revenis" en la politikan vivon, kaj laŭ kiuj konsideroj la 20an de novembro 1959 decidis la CK de Hungara Socialisma Laborista Partio akcepti kiel proprajn membrojn la iamajn anojn de la Partio de Hungaraj laboruloj, funkciinta ĝis 1956?) Nia ekonomia historiografio jam demonstris: ekde 1958 *fortiĝas la malnovaj dogmemaj ekonomipolitikaj principoj.* Decembro 1958: akcelo de la agrikultura kolektivigo, en kiu la politikaj rimedoj ŝanĝiĝis kompare al la simila kampanjo en 1951, sed kiel tiam, ankaŭ nun oni ne antaŭvidis la problemojn, kiujn elvokis la kolektivigo: tion, ke multaj homoj (precipe gejunuloj) forlasas la vilaĝojn serĉante laboron en la urboj, post 1968, pola post 1980. Necesus esplori, kian rolon ludis en la sukcesa hungara konsolidiĝo la mondekonomia konjunkturo, disvolviĝinta ekde 1945, kaj la samtempa ioma politika proksimiĝo inter Sovetio, Usono kaj Okcidenta Eŭropo? Kaj ankoraŭ: kiagrade dependas la konsolidiĝo de la individuaj kvalitoj kaj karaktero de la ĉefa gvidanto, havanta tre signifan rolon en la centrisma politika mekanismo de la popoldemokratiaj landoj?)

1958-1961. Post la morto de Stalin estas nova fenomeno en la internacia laborista movado *la fortiĝo de Ĉinio kaj Maŭ Zedong.* La rumana gazetaro frue notas la fakton: ĝi parolas pri „du socialismaj grandpotencoj". (Temo por disertaĵo: kiel Ĥruŝĉov kaj la soveta gvidantaro inter 1955-1961 klopodas havi „ekvilibron" inter la Maŭ Zedong-a Ĉinio kaj Jugoslavio de Tito? Tito estas reprezentanto de la memstare, naciskale realigota „komunismo-modelo", li konfesas karakterize kontraŭ-stalinismajn ideojn; Maŭ Zedong vidas en la Jugoslaviaj strebadoj nur reviziismon, li restas fidela al la ideoj de Stalin, kritikas la 20an kongreson de la soveta partio.) La ĉinaj kaj sovetaj dokumentoj pri la epoko estas nekonataj. Ni ne konas ankaŭ la „kompromisojn", kiujn faris la Ĥruŝĉova politiko por „reteni Ĉinion en la tendaro". La ĉinan starpunkton subtenis la eventoj en Pollando dum junio-julio, kaj en Hungario dum oktobro de 1956, precipe la fakto, ke ili evoluis ĝis armita konflikto. Ŝajnis tiel, ke la memkritiko, entute la fakto, ke kaj la drastan malpliiĝon de la agrikultura produktado. En tiu tempo ekas nova ondo de industriigo, kun prefero al la peza industrio.

Tradukis: V. Benczik

Daŭrigota.

Mikaelo Ternavski: MEVOJ

tie kie mi loĝas
ne estas maro nek mevoj
mi vidis la mevojn
nur en kinejo kaj sur bildoj
sed en la kinejo kaj sur la bildoj
la mevoj
flugas super la maroj
jen kiam mi trafis
en fiŝistan loĝlokon
mi unuafoje ekvidis
kiel la mevoj serĉadas nutron
sur apudbordo
sur kortoj de fiŝistoj
kaj eĉ sur balaaĵo
kiel ordinara
hejmbirdo

mi ne mallaŭdas ilin
sed mi devas diri
ke mi estis surprizita
per tia vidaĵo
mi ja alkutimiĝis al tio
ke la mevoj
flugas super la maroj

Lajos Bíró en Novgvineo

La scienca ekkono de la dua plej granda insulo de nia planedo komenciĝis eksterordinare malfrue. Nur en la 70aj jaroj de la pasinta jarcento venis ĉi tien la ruso Mikluho Maklaj. Preskaŭ samtempe la italo Albertis kaj la germano Finsch.

En 1891 ankaŭ la juna hungara arkeologo kaj folkloristo Samuel Fenichel atingis tiun ĉi insulon. Li pasigis tie du jarojn, kaj sendis la sciencajn rezultojn, kolektaĵojn ktp. al la Hungara Nacia Muzeo. Sed lin pereigis malario.

Lian laboron oni traktis en memorkunsido de la Naturscienca Societo en 1895. La kunsido finiĝis per neatendita evento: stariĝis 39 jara fakulo, kaj diris:

„Do, estas valoraj la aĵoj kolektitaj de Fenichel, kaj se ne troviĝas iu, kiu daŭrigus lian laboron, jen: estas mi, kiu daŭrigos ĝin!"

La sinanoncon sekvis granda entuziasmo, ĉar la ĉeestantoj konis la sinanoncinton.

Tiu viro estis Lajos Bíró, kiun la vivo ne tro karesis. Li naskiĝis en familio de malriĉa meblisto, kiu havis 17 infanojn. Jam en la infanaĝo li ŝatis la naturon, ellernis la ŝtopadon de birdoj, kolektis plantojn, ktp. kaj precipe bone konservis la kolektitajn insektojn.

Li volis veturi kiel misiisto al nekonataj teritorioj, pro tio li fariĝis studento en la teologia fakultato Debrecen. Sed lin prefere interesis la biologio kaj la lingvoj. Li daŭrigis la studojn en la Scienca Universitato, por pli perfektigi siajn sciencajn konojn.

„Por tiu daŋĝera vojo necesas tia homo, kiu ne povas perdi ion krom la vivo. Ĝuste tial mi faris la studojn natursciencajn, kiujn mi pensis necesaj por la venontaj celoj."

Komence li laboris kiel privata instruisto, poste ĉe la Insektaj Stacioj, dum la vitpereo, kiel „filoksera komisaro". Dume li studadis la bestaron de la Karpatbaseno, kolektis ĉion, kaj vendis la kolektaĵon al la Nacia Muzeo, kaj per ties prezo li bone ekipis sin por veturi en Novgvineon en 1895.

„Mi ne havas eblecon veni kun 6-7 helpantoj por labori unu jaron, do, mi restos 6 aŭ 7 jarojn kaj tiel egaliĝos la bilanco."

Ankaŭ lin ne evitis la malario, sed li renkontis elstaran germanan kuraciston, la fondinton de la moderna bakteorologio: Robert Koch, kiu klarigis, ke la malarion disvastigas la kuloj. Li kuracis Lajos Bíró. Dum duona jaro ili loĝis proksime unu al la alia, kaj elformiĝis inter ili amikaj rilatoj.

Estis aliaj malfacilaĵoj, kiel skribis Bíró: „Ne nur la klimato malhelpas la laboron, estas ankaŭ aliaj malfacilaĵoj. Antaŭ nelonge mi pretigis falkon kaj kazuaridon por ŝtopi, sed ilin tiom tratruigis la forkoj, ke ili ambaŭ tute fuŝiĝis. Mi devis pendigi ĉion per ŝnuroj, sed tio ne multe helpis. Miajn librojn, ledajn aĵojn kovris ŝimo, kaj tiuj, kiujn oni gluis per gluo, disfalis."

Lia kolektaĵo konsistanta el pli ol 200.000 pecoj enhavis pli ol 2000 tiajn specimenojn, kies sciencan priskribon oni povis fari surbaze de lia laboro. En la universala scienco lian nomon „eternigas" 130 bestospecimenoj. La direktoro de la Frankfurta folklormuzeo amare diris:

„Ĉu ne estas hontinde rilate nian germanan sciencon, ke teritoriojn kiujn ni jam havas sub la germana standardo, hungara zoologo esploras?"

Sed Lajos Biró faris ne nur zoologiajn esplorojn en Novgineo. Li havis en sia kolektaĵo 6000 objektojn, kaj tiu ĉi indiko strikte substrekas lian senlacan laboron.

La indiĝenoj nomis lin „mariengien" — granda sorĉisto, kaj tre ŝatis lin. Li ellernis ilian lingvon, kutimojn kaj morojn, kaj ekkonigis al ili la uzadon de la metaloj.

„La papuoj eĉ nun vivas en havaĵkomunumo" — li skribis tiam —, „per komuna laboro ili ekstermas la arbaron, kune preparas barilon ĉirkaŭ la kampoj, por ŝirmi ilin kontraŭ la aproj. Ili konas ankaŭ la porkon, sed tio estas raraĵo. Ilia ĉefa nutraĵo estas la taro-radiko, kiu nur kuirite estas manĝebla, ĉar enhavas venenon. Kokinojn ili ankaŭ bredas pro ties plumoj, kiuj estas ĉe ili la plej preferinda ornamaĵo."

Li regule sendis hejmen leterojn. Li sisteme traesploris la teritoriojn kaj ekkonis bone la nordorientan parton de la granda insulo. Multajn, ĝis tiam ne konatajn lokojn li malkovris tie.

Post dujara laboro lia sanstato tiom malboniĝis, ke li devis veturi al Singapur por ripozi iomete. Sed anstataŭ tio, li eĉ tie ĉiam vizitis muzeojn, bibliotekojn, vojaĝis al Kuala Lumpur, al la Java insulo ktp. Fine li iom ripozis en Sydny.

„Mi tie ĉi estis nur ministo, kiu portas al la sunlumo la krudajn rokegojn, el kiuj pli inicitaj manoj elektas la juvelŝtonojn, kaj metas ilin en la ornaman kronon de la naturscienco."

Tiu ĉi granda modesteco rezultigis, ke oni nur tre malofte mencias lian laboron. Tamen lian nomon ne kovris la ĝangalaj lianoj. Gardas ĝin ĉefetrato en la ĉefurbo de Novgvineo, kie li laboris 7 jarojn. Antaŭ nelonge oni starigis al li monumenton tie.

Hungaraj zoologoj taksas inde daŭrigi lian laboron, kaj tiel eternigi la nomon kaj memoron de la fama natursciencisto kaj esploristo: Ludoviko Bíró.

Tibor Beŝŝenyei

MÁRTON FEJES

Efektiviĝo de evolutendencoj de la beletra lingvo — laŭ analiza komparo de tri tradukoj el „La Tragedio de l' Homo"

Tiu ĉi studaĵo verkiĝis nek por prelego, nek por skriba publikigo. Temas pri privata entrepreno: esperantistoj kiu praktikas la lingvon precipe per tradukado el la hungara lingvo al Esperanto — ekinteresiĝis pri la evolutendencoj de la beletra lingvo kaj komencis studi: kiamaniere kaj kiagrade efektiviĝis tiuj tendencoj jam menciitaj en pluraj bonaj eseoj de Kalocsay, de Auld kaj de aliaj aŭtoroj.

La vidpunktoj de la studanto estis:

1. La originalo de la esplorotaj tradukoj estu altvalora poezia ĉefverko de la mondliteraturo, kaŭzanta ne facilan taskon por la tradukisto.
2. La tradukistoj de la pli frua kaj posta tradukaĵoj estu reprezentantoj de malsamaj tendencoj, sed kun egala talento kaj aŭtoritato.
3. La tempo inter la du tradukoj estu minimume 50 jaroj.

Ne abundas tiaj verkoj en nia tradukita literaturo. Pri komparo de tradukoj el Shakespeare-aj dramoj: Hamlet kaj Reĝo Lear la studanto devis rezigni pro la nekono de la angla kaj germana lingvoj.

Tiel restis por komparo „La Tragedio de l' Homo", kiu havas eĉ plurajn tradukojn, almenaŭ fragmente. Tiujn de Altenburger kaj Schatz mi intence neglektis, ĉar tiuj provoj ne konvenas al la kondiĉo, ke la tradukintoj posedu egalajn kvalitojn...

Géza Bárczi, iama ĉefredaktoro de „La Verda Standardo" en la jaroj 1913-1914 tradukis sep bildojn, ankaŭ publikigis ilin en sia revuo. Tiu traduko jam merita atenton, kaj eltenas la komparon kun la traduko de Kalocsay, kiu aperis en 1965.

Nature ne estis eble eviti la unuan tradukon de Kalocsay el la jaro 1924.

Ĉar el ĉiuj komponentoj de la lingvo plej rapide ŝanĝiĝema estas la leksiko, mi koncentris mian atenton al tiu tereno; gramatikajn problemojn kaj stilevoluon mi mencios nur se tiuj estas rezulte de ŝanĝoj en la leksiko.

Por detala esploro mi elektis la VIII-an kaj IX-an bildojn en amplekso de ĉ. 500 versoj, krom tio mi ellevis kaj komparis tiujn fragmentojn el la sep bildoj, kiuj fariĝis flugfrazoj.

Mi malatentis tendencojn listigitajn far pluraj aŭtoroj: abortitajn, morte-naskitajn, arbitrajn elpensaĵojn; studis nur la efektiviĝintajn.

Fine de aŭgusto, kiam organizantoj de la 5a Internacia Literatura Forumo petis min per io kontribui al la programo, nur tiam mi prenis miajn notojn kaj decidis koncepti la sekvan tekston, rezulton de mia studado.

Mi faris tion, ĉar mi multe lernis, ĉerpis eĉ profitis dum tiu studado kaj tiel mi povos dividi miajn rimarkojn kun aliaj literaturamantoj; kaj krome ĉar per publikigo de tiu ĉi studaĵo mi volas omaĝi al la du eminentuloj: al Géza Bárczi kaj Kálmán Kalocsay.

1. LINGVOEVOLUO LAŬ EFIKO DE EKSTERAJ FAKTOROJ

Tiu ĉi evoluo, t.e. influo de naciaj lingvoj, kulturaj, historiaj tradicioj al la Internacia Lingvo ĉiam rezultigas pliriĉiĝon de la lingvo, enkondukon de neologismoj. (Krom la influo de naciaj lingvoj menciindas ankaŭ reefiko de Ido al Esperanto.)

Al la eksteraj faktoroj apartenas ankaŭ la sociaj-politikaj cirkonstancoj kaj la scienca-teĥnika nivelo de la socio, en kies kondiĉoj la lingvo ekzistas. Do: la evoluo de sociaj kaj natursciencoj, la evoluo de la teĥniko ankaŭ rezultigas neologismojn. Kio estas neologismo? Laŭ la difino de PIV neologismo estas: 1.) „Vorto enkondukita en unu lingvon, kie ĝi ĝis tiam ne estis uzata",
2.) (ĉe Z.) „Nova formo de vorto fundamenta, uzebla paralele kun ĝi, sed neniam ĝin malaperigonta".

En la tri tradukoj estas distingeblaj kvar tipoj de neologismoj:

1. Neologismoj anstataŭ mankantaj vortoj,
2. Neologismoj anstataŭ vortgrupoj kaj tro derivitaj vortoj,
3. Neologismoj anstataŭ MAL-vortoj,
4. Neologismoj por pli konkretigi, pli nuancigi.

Estas konstateble, ke Bárczi uzis nur la unuatipajn, nome:

1.1. Neologismoj anstataŭ mankantaj vortoj

Al tiu kategorio apartenas vortoj, kiuj naskiĝis en la historio kaj kulturo de certaj nacioj, kaj ĝenerale estas ne tradukeblaj, tamen nepre enkondukendaj.

Tiaj estas: *Konvento* (Convent): nacia kunveno dum la franca revolucio, *sankuloto* (ĉe Bárczi),

sanskuloto ĉe Kalocsay — por nomi anojn de revolucia klaso.

La enkonduko de tiaspecaj neologismoj estas plene motivata. Similaj estas ankoraŭ ĉe Kalocsay: *bañanalo* en la senco: orgio, feste de Baño, *famulus* (el latina) kun signifo disĉiplo — helpanto (tiu vorton uzas ankaŭ Bárczi); kaj *tibio* ne en anatomia senco, sed por signi longan, rektan blovinstrumenton ĉe la romianoj.

En la traduko de Bárczi troviĝas pliaj tri neologismoj: *inkubsonĝo* — la vorto kvankam Zamenhofa, sed tiutempe ankoraŭ ne oficialigita, kaj astrologiaj terminoj: *konjunkturo* kaj *klimaktera*. (Menciindas, ke ankaŭ en la originalo tiuj vortoj estas el la latina.)

1.2. Neologismoj anstataŭ priskribaj vortkunmetoj kaj tro derivitaj vortoj

En la traduko de Bárczi oftas la komplikaj, artefaritaj vortkunmetoj kaj troderivitaj vortoj, tamen ne sufiĉe precizaj, ne plene adekvataj al la tradukota nocio. Tiujn Kalocsay penis eviti.

(VIII.) „*Baljóslatú jel* tűnt fel udvarában
Már múltkor is, ott a Kígyó fejénél."
(B) „Aperis ĉe la kapo de l' serpento
Malbonon divenanta ia signo"

(K_1) „*Omena sign'* en ĝia kort' aperis
Jam antaŭ tagoj, ĉe l' Serpenta Kapo."

(K_2) „En ĝia kort' aperis *omensigno*
jam antaŭ tagoj, ĉe l' Serpenta Kapo."

(Ĉe citaĵoj la vicordo restos kiel supre
1. El la originalo
2. El traduko de Bárczi (kun aŭ sen indiko) (B)
3. Traduko de Kalocsay el 1924 (K_1)
4. Traduko de Kalocsay el 1965 (K_2)
Se sin sekvas nur du tradukcitaĵoj, tio signifas, ke la koncerna parto aspektas same en ambaŭ tradukoj de Kalocsay. La romiaj ciferoj montras, el kiu bildo estas la citaĵo.)

Tiu *omena sign'* kaj *omensigno* je unua vido sajnas esti pleonasmo, ja la latina vorto *omen* (uzata ankaŭ internacie, eĉ far de Grabowski jam ankaŭ en Esperanto) signifas: malbona antaŭsigno. Tamen, ambaŭ formoj estas ĝustaj, ĉar en la teksto temas ne pri ia ĝenerala signo, sed pri okule, pli ĝuste: pri binokle perceptebla, konkreta astronomia fenomeno.

(VIII.) „Végig borzongat; elfordul szemem.
Nem bírom e szörnyű *káprázatot*."

(B) „Mi frostotremas, la okul' blindiĝis,
Mi ne eltenas tiun ĉi teruran
Trompbildon."

(K_1) „Mi frostotremas, turnas for okulojn,
Mi ne eltenas la *vidtrompon* monstran!"

Sceno el „La Tragedio de l' Homo"

(K_2) „Horore mi deturnas la okulojn,
Ne eltenante la *fantasmon* monstran."

Ĉi tie *fantasmo* kun signifo: timiga viziaĵo ŝajnas esti pli trafa ol *trompbildo* kaj *vidtrompo*.

Sub tiu ĉi punkto mi prezentas ankaŭ ŝanĝojn, kie vortgrupojn uzatajn far Bárczi Kalocsay anstataŭas per vortkunmeto aŭ vorto jam ne kalkulata „neologismo", ĉar ĝi intertempe aperis en unu el la „Oficiala-j Aldono"-j.

(VIII.) „Időjóslást szeretnénk"
(B) „Mi bezonas *antaŭdiron pri vetero*"
(K_1) „*Veterdivenon* mi bezonas"
(K_2) „*Veterprognozon* mi bezonas"

Alia ekzemplo:

(IX.) „Minő rokonszenv kelhet e kebelben?
Mi *gyöngéd érzés* a nőtigrisé?"
(B) „En tiu ĉi brust' kia simpatio
Vekiĝi povas? Kiaj povas esti
La *delikataj sentoj* de tigrino?"
(K_1) „Ho, kian simpation tia sin'
Kaj kian *amon* havas la tigrino?"
(K_2) „Ha, kian simpation tiu brusto,
Kian *teneron* havas la tigrino?"



Sceno el „La Tragedio de l' Homo"

Neologismojn aŭ pli novajn vortojn anstataŭ troderivitaj ni trovas:

csőcselék — *popolaĉo* — kanajloj
pimasszá — *sentaŭgulo* — fripono
főcinkosuk — ĉef' ilia — *kunkulpulo* — ĉefkomplico.

1.3. Neologismoj anstataŭ MAL-vortoj

Interesa estas la rezulto post la nombrado de MAL-vortoj en la tri tradukoj de la VIII-a kaj IX-a bildoj:

Bárczi uzis sume 40 da ili,
Kalocsay en 1924 uzis 25,
en 1965 nur 16.

Eble tiuj ŝanĝoj estis kaj estas pleje riproĉataj de multaj bonaj esperantistoj, kiuj timas, ke anstataŭ ĉiuj MAL-vortoj oni devos lerni novajn radikojn.

Tamen, la ofta ripetado de la sama elemento kaŭzas ne aliteracion, sed malagrablan monotonecon por la oreloj, kian ni sentas aŭdante adasismojn.

(VIII.) „Tán megszállott már titeket is
Az újításnak átkos szelleme?
Úgy el szememből! Nem szenvedhetem
E fajt, mely oly epés, bús felfogással..."

(B) „Ĉu eksposedis eble ankaŭ vin jam
Spirit' *mal*bena de la reformemo?
Do for de mi, ĉar mi *mal*amas rason
De tiuj, kiuj kun *mal*ĝoj sarkasma..."

Tiuj tri MAL-vortoj en sinsekvaj tri versoj fakte ne sonas bele. Ĉe Kalocsay restis nur unu:

„Ĉu eble jam obsedis ankaŭ vin
spirito *mal*benita de reformoj?
Do for de mi! Mi ne eltenas tiun
homspecon, kiu kun percepto gala..."

aŭ eĉ en la sama verso ni trovas du MAL-vortojn ĉe Bárczi

(VIII.) „Császár pénztára többnyire üres.
Sok kérelemre rendetlen fizetnek."

(B) „La kaso de l' imperiestro estas
*Mal*plena, oni pagas tre *mal*orde."

(K_1) „La kas' imperiestra ja *mal*plenas,
Post multa pet' senorde oni pagas."

(K_2) „La imperiestra kaso estas *vaka*
post multa pet' neglekte oni pagas."

Tiu ĉi adjektivo „vaka" eĉ en la glosaro de la dua traduko de Kalocsay estas inter „neologismoj" malgraŭ tio, ke la infinitivo: *vaki* enestis en la E-a vortaro de KABE jam en 1910, kun signifo: esti libera, neokupata.

Similan motivitan ŝanĝon de MAL-vorto ni trovas aliloke:

(VIII.) „Ily hűvös este e tűz jól esik"

(B) „Tre bone estas sidi dum *malvarma Vesper'* ĉi tia ĉe la fajro"

(K_1) „En *frosta nokto* bone tuŝas min Ĉi fajro"

(K_2) „En *frisk' vespera* bone tuŝas min ĉi fajro".

Finfine la dua traduko de Kalocsay solvis la problemon per la enkonduko de Ido-devena neologismo *frisk'; ĉar* nek *malvarma,* nek *frosta* estas adekvataj al la hungara adjektivo „hűvös".

Ĉe tiuj versoj rimarkindas ankaŭ alia diferenco: uzo de *ĉi* anstataŭ *ĉi tia.*

Alia ŝanĝo, neologismo anstataŭ MAL-vorto:

megvetve életet - vivon kaj morton *mal*ŝatante — senĝoje *disdegnante* vivon-morton, kie *disdegni* signifas: malrespekti, ne taksi, abomeni.

1.3.1. Ŝanĝo de MAL-vortoj, per aliaj fundamentaj formoj

(VIII.) .....„Ottan áll
Egy férfi, arcán e sötét jelek"

(B) „Tie staras
Jen vir' kun *mallumeg*' sur la vizaĝ'"

(K) „Tie5H staras

Vir' kun ĉi nigraj signoj survizaĝe."

(Koncerne ĉi verson supozeblas, ke Kalocsay faris la vortŝanĝon simple por eviti tri apostrofojn.)

Similaj ŝanĝoj estas:
avult eszményidet — idealojn *malnoviĝintajn* — idealojn eluzitajn — ekstempajn idealojn; kicsinyes — *malgrandece* — bagatele; börtön — malliberejo — karcero — prizono.

1.4. Neologismoj por pli konkretigi, pli nuancigi

Estas vortoj ĝenerale uzataj en diversaj situacioj. Ekzemple: *sinjoro* ĉe Bárczi estas uzata kiel:

1. Ĝenerala alparolo al viro
2. Alparolo al reĝo
3. Alparolo al Dio.

Por fari diferencon, por alparoli reĝon Kalocsay enkondukis la vorton *siro* kun signifo: reganta moŝto, reĝa moŝto. Simila neologismo estas: *pietato* anstataŭ *pieco*.

(IX.) „Oh Danton, magasztosabb
Kegyelettel megóvni a romot"

(B) „Ho, Dantono, estas pli
Majesta: *kun piec'* gardadi la
Ruinon"

(K_1) „Ho, Danton, pli noble estas
Kun *pietato* gardi la ruinojn"

(K_2) „Ho, Danton, pli noble estas
ruinojn ŝirmi *pietate* ol."

En tiuj versoj *pieco* estas pli ĝenerala, la vorto *pietato*, proponita far Kalocsay en la senco: „respekta sento pri mortintoj aŭ tradicioj" pli konvenas al *kegyelet*, kio staras en la originalo.

1.5. Reefiko de Ido al Esperanto

La lingvoprojekto Ido — kies apostoloj propagandis ĝin kiel „Plibonigitan Esperanton" — malgraŭ sia fiasko kiel memstara „Linguo Internaciona" — tamen kontribuis al la riĉigo de Esperanto; plurajn vortojn, ankaŭ afiksojn „pruntis" esperantistoj el ĝi.

Granda parto da ili venis anstataŭ MAL-vortoj:

(IX.) „Ne ily kemény szót e gyöngéd ajakról"

(B) „Ne parolu tiel
Malmolajn vortojn lipoj delikataj"

(K) „Ho milda lip', ne tiel *durajn* vortojn"

(VIII.) „Oh! Tárd ki, tárd ki végtelen nagy ég,"

(B) „*Malfermu*, ho *malfermu*, ho ĉiel' senlima"

(K_1) „*Malfermu*, montru, ho ĉiel' senlima"

(K_2) „*Apertu*, montru al mi viajn sanktajn..."

Ido-devenaj estas: acerba, aŭstera, bruska, dista, febla, feroca, fola, fripono, humida, kurta, noci, obskura, olda, poltrona, povra, plumpa, superba, tarda.

Tiel mi devas mencii ankaŭ la vorton: *estiel*, ĉar kiel idistoj laŭ „principo de precizeco" disigis la adverbon *kiel* je *kom* kaj *quale*, por fari similan distingon ekuzis Kalocsay tiun formon: estiel = identiga kiel.

1.6. Resume pri „neologismoj" en la spegulo de ciferoj

Konstateblas, ke la enkonduko de ĉiuj kvar tipoj de „neologismoj" estas motivata. La tekstoj pli mallongiĝis, la nocioj pli konkretiĝis, la lingvaĵo fariĝis pere de ili pli beletra, pli poezia.

— Kial mi uzas la vorton „neologismo", ĉiam inter citiloj? Mi jam citis difinon de PIV: neologismo estas: „vorto enkondukita en unu lingvon, kie ĝi ĝis tiam ne estis uzata."

Fine de la unua traduko de Kalocsay Troveblas „Tabelo de neoficialaj vortoj", kiu enhavas kaj klarigas 80 esprimojn, menciante ankaŭ ties fontojn.

Interese, elinter tiuj okdek deko jam estis uzata far Zamenhof; ekz.: *absolvi, angora, aŭreolo, epitafo, filistro, infuzorio, inkubo*, ks.

Kiel fonto de aliaj ĉ. sesdek vortoj estas indikata nomo de Grabowski, Kabe kaj diversaj vortaroj.

Entute nur ses vortoj estas signataj per mallongigo PR, kiu montras, ke temas pri vorto proponita propre far Kalocsay, do fakte nur tiom estas la nombro de „neologismoj", „vortoj ĝis tiam ne uzataj".

Kaj ni aldonu: jam ĉiuj tiuj okdek vortoj troveblas en PIV, kelkaj kun vinjeto de poezia vorto, plejparto sen ia ajn distingilo.

La dua traduko de Kalocsay listigas kaj klarigas pliajn 58 „neologismojn" en glosaro, sed granda parto de tiuj nur pro tio estis rigardata „neologismo", ĉar ili ne estis tiutempe jam oficialigitaj far Akademio, t.e. ili ne eniris n la tiutempe aperigitajn Oficialajn Aldonojn. PIV jam eĉ el tiuj 58 vortoj transprenis 50.

Ankaŭ tiuj faktoj pruvas, ke neologismoj portis riĉiĝon en la lingvon, ne nur en la beletro, sed ankaŭ en la ĉiutaga lingvouzo.

István Nemere

MATO

En la pasinta jaro, printempe oni komunikis al mi surprizan sciigon: la loĝantoj de Robbers-Galaksio alvokis la teranojn por ŝakludpartio... Jes, mi iomete devas klarigi al vi la aferon. Antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj la tiamaj homoj sendis al tiu direkto esplorcelan aŭtomatan spacveturilon. Por eventuala okazo de renkontiĝo kun reprezentantoj de fremda civilizacio, tiuj veturiloj kunportis multajn objektojn informantajn pri la teraj homoj, ilia ĉiutaga vivo, kutimoj. Inter aliaj do estis en ĝi tridimensia faklibro pri ŝakludo. Tiel komenciĝis tiu surpriza afero...

Videble la faklibro falis en manojn de saĝaj vivaĵoj. Kaj ĉar intertempe ankaŭ ni inventis la superradio-ondojn, kiujn konis ankaŭ la Robbersanoj, do ekestis kontakto inter la Tero kaj la Robbers-Galaksio.

Sed kial turnis sin ĝuste al mi la gvidantoj de Tero? Ĉu mi ankoraŭ ne diris...? Nu, pro tio, ĉar tiutempe jam de multaj jaroj mi estis la ĉampiono pri ŝakludo en la tuta Sunsistemo. Ĉiam mi estis homo strebanta.

La ĉefuloj kompreneble premadis mian manon, la filmistoj filmis min el ĉiuj flankoj, ili incensis min diligente. Eksciante, pri kio temas, ankaŭ mi fariĝis fiera: „Nu, mi montros al ili, kiel oni devas ludi ŝakon...!"

Tiuj en Robbers-Galaksio certe ellernis ankaŭ nian lingvon, ĉar iliaj radiomesaĝoj estis tute kompreneblaj. „Ni pretas, vi batalos per la helaj figuroj!" — ili mesaĝis. „Batalos?" — nur por momento mi enpensiĝis. Mi estus preferinta la esprimon „ludos"...

Tiutempe ĉiuj sur la tuta Tero parolis pri mi kaj pri ili. En la palaco de la Mondfederacio oni starigis egan ŝaktabulon kaj ne mankis ankaŭ la televidaj kameraoj. Kiam ĉio pretis, solene mi faris la komencan paŝon per peono staranta antaŭ la reĝo. Poste la ĉeestantoj de la solenaĵo povis hejmeniri; ja pri mia ludpaŝo la Robbersanoj informiĝos nur post kvar tagoj, kiam la radiaj superondoj alvenos al ili. Tiam ili komencos pensi kaj emisios informon pri sia paŝo — tion ni ekscios denove nur post pliaj kvar tagoj.

Komence mi provadis fari etajn artifikojn — ekzemple tiun „maton post kvar paŝoj" — sed miaj kontraŭuloj certe bonege ellernis la ŝakludon, ĉar ĉiuj artifikoj montriĝis senefikaj.

Dumtempe sur la Tero ĉiuj cerbumadis, kiaj estas la loĝantoj de la Robbers-Galaksio, kiel ili aspektas? Ĉu nur unu el ili ŝakludas kontraŭ mi, aŭ pli multaj komune? Iuj eĉ asertis, ke la Robbersanoj uzas por la ludo komputilon. Sed ĉiuj senescepte volis konsili al mi per leteroj, telefonoj, telegramoj, eĉ radio. Ĉiuj imagis sin ĉampionoj pri ŝakludo. En urboj, kluboj, parkoj — sed eĉ en Lunaj kaj Marsaj urboj — ŝak-kompetentuloj sidadis vespertempe kun kapo inter manplatoj. Sur la tabuloj ĉie vidiĝis la aktuala stato de la Granda Partio...

Oni tuj liberigis min de ĉiu laboro kaj donis apartamenton en la palaco de la Mondfederacio: oni plenumis ĉiujn miajn dezirojn. Ĉiuj volis zorgi pri la nimbo de la Tero. Kuracistoj gardis mian sanon, detektivoj la sekurecon.

Du monatojn poste jam bonege daŭris la partio. Tiuj Robbersanoj estis duraj kontraŭuloj. Ili rebatis miajn atakojn, poste ili mem komencis ataki. Foje-foje mi havis malfacilaĵojn, sed mi sukcesis elpensi kontraŭpaŝojn.

Ĝis la sekvonta printempo ŝanĝiĝis la situacio. La Robbersanoj ĉiam pli multe da miaj — niaj! — figuroj forprenis. Mi ne povis kapitulaci — kion estus dirantaj la homoj sur la Tero? Certe oni linĉus min; do mi devis batali ĝisfine.

Iutage la Robbersanoj forprenis mian duan turon kaj kune kun la kodita ŝakpaŝo alvenis perradie ankaŭ ilia mesaĝo: „Do, vi perdis la Marson...!"

Ni kredis, ke misfunkcias la radioaparato. Sed la teknikistoj trovis nenian malnormalaĵon. La mesaĝon ni komprenis nur sekvonttage, kiam el la Marso alvenis malesperiĝinta informo: la tieajn homajn koloniojn okupis nekonataj, nevideblaj vivaĵoj — poste interrompiĝis ĉiuj kontaktoj kun la Marso.

Ni ŝakludis plu. Du semajnojn pli poste mi perdis preskaŭ la lastajn figurojn. Sekvonttage la nevideblaj vivaĵoj invadis la Venuson. Tiutempe jam neniu dubis ĉe ni, pri kio temas. Okazis fantazia miskompreno — la loĝantoj de la Robbers-Galaksio tute serioze komprenis la intergalaksian ŝakpartion! La vortojn en la faklibro — „batalo" kaj la „celo de la ludo" — ili traktis kiel esprimojn pri vera batalo: milito. Ili ludis por veraj celoj... Nun jam mi komprenis, kial ili radiomesaĝis komence: „Vi batalos per la helaj figuroj..."

Dum la sekvontaj tagoj vere mi bezonis la korpgardistajn detektivojn. Subite multege da

homoj volis linĉi min, la „perfidulon de la patrujo". Ofte mi devis kaŝi min sur la plej alta etaĝo de la palaco. Inter tiaj cirkonstancoj ne mirinde, ke mi perdis la partion — mia sola reĝo devis eniri en angulon kaj proksimiĝis la situacio, kiam oni donos al mi maton.

Ilia radiorespondo rapide alvenis; la Robbersanoj tiam jam estis okupintaj la Lunon, de tie ili komunikis al mi sian lastan paŝon. En la palaco mi restis sola. Ĉiuj fuĝis.

La radioaparato eldiris la lastan vorton: „Mato". Sammomente mi eksentis, ke mi jam ne solas — ili estis apude, nevideble. Unu el ili rekone frapetis mian ŝultron...

* * *

Sed niaj ŝakludpartioj ne finiĝis. Mi plu ludas. La Robbersanoj honoras min. Mi havas ĉion necesan. Jes, mi scias, ke la loĝantoj de la Tero kredas min perfidulo, kiu vendis la Sunsistemon; pro mi ili fariĝis sklavoj. Sed...

Sed li — kun kiu mi ĉiutage ŝakludas — estas la gvidanto de Robbersanoj. Tre bona knabo. Li diris: se mi gajnas eĉ unu ŝakpartion, ili redonos al ni Aŭstralion. Se poste denove mi venkos foje — ankaŭ Afrikon. Por ĉiu venko mi povos reakiri po unu kontinenton, poste la tutan Teron, eble eĉ iam ankaŭ la Venuson, la Marson...

Eĉ unufoje mi ne sukcesis venki ankoraŭ. Sed insiste mi ludas plu.



PANORAMO

Vizito al Pekino

En januaro Ferenc Havasi, sekretario de la CK de la Hungara Socialisma Laborista Partio laŭ la invito de la CK de la Ĉina Komunista Partio veturis al Pekino. Kun la gvidantoj de ĈKP li pritraktis ĉefe la eblojn de la ampleksigo de la ekonomia kunlaborado inter la du landoj. Li transprenis inviton por János Kádár — la daton de la vizito de Kádár oni difinos poste.

Aŭtomobiloj maljuniĝas

En Hungario la civitanoj posedas ĉ. 1,5 da milionoj da aŭtomobiloj. Pro la nesufiĉaj importebloj dum la lastaj jaroj, la averaĝa aĝo de tiuj veturiloj estas 8,5 jaroj, kio lanĉas ĉefe problemojn ekonomiajn (tiuj aĝaj „kvarraduloj" konsumas multe) kaj medioprotektajn. Krome signifa ono de la aŭtomobiloj havas du-tempan motoron; tiuj pli ol la kvartempaj malpurigas la medion. Sur la foto: du-tempaj „Trabant"-oj el GDR.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Hungara tenisistino

La hungara tenisistino Andrea Temesvári dum la lastaj jaroj akiris grandan renomon por la hungara sporto. Unu post la alia ŝi gajnas en gravaj internaciaj konkursoj, en kiuj partoprenas la plej bonaj tenisistinoj de la mondo.

Sur nia foto: post venko ŝi ricevas gratulan kison.

Britaj muzikistoj en Budapeŝto

Fine de januaro la fama brita muzikensemblo „Deep Purple" vizitis Budapeŝton, kaj prezentis al la hungara publiko tri koncertojn en la Sporthalo Budapest. La koncertoj havis grandan sukceson inter la hungaraj gejunuloj, kiuj unuafoje povis ĉeesti koncerton de la fama ensemblo.

Sur nia foto: sceno el la koncerto.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANNONIA
HOTELS & RESTAURANTS

* Via hejmo en Hungario

La Hotela kaj Fremdultrafika Entrepreno Pannónia ofertas al negocistoj, vizitantaj Budapeŝton, siajn unuaklasajn hotelojn, kaj al turistoj siajn 2-3 stelajn hotelojn en Budapeŝto kaj Okcidenta Hungario.

La somerumantojn sur la suda bordo de Balatono atendas longa vico de hoteloj, restoracioj, ĉardoj kaj noktaj amuzejoj.

La Entrepreno Pannónia funkciigas la Budapeŝtan Kongresan Centron, kiu prezentas elstarajn kondiĉojn por kongresoj, aliaj aranĝoj kaj ĉiuj pli multnombraj kunvenoj.

Niaj Karaj Gastoj eksterlande turnu sin al la reprezentantoj de Pannónia Tourist Service.

En FR Germanio:

D-2000 Hamburg
Neuer Wall 43
Tel.: 0 40/37 3246 Tx.: 216-2 634

D-8000 München 2
Viktualienmarkt 3
Tel.: 0 89/29 9539 Tx.: 521-4 052

En Aŭstrio:

Reisebüro Dengg
A-8010 Graz
Radetzkystrasse 5
Tel.: 3 16/76 321 Tx.: 31-11 514

Reisen und Freizeit
A-5020 Salzburg
Ferdinand-Hanusch-Platz 1
Tel.: 06 62/84 5571 T.: 63-3 867

REVUO DE REVUOJ

La konkuro en armiĝado estas tiel malnova kiel la homaro — asertas — eble iomete troigante — tamen tragike prave en esenco¿artikolo de SAT AMIKARO (12.), organo de franclingvaj organizaĵoj. La aŭtoro aludis la konatan teruriĝan ciklon de la ŝildo kaj glavo, kiun la spaca milito volas kroni, definitive ĉesigi ĝin per mondfina katastrofo. Logike, tamen verve la artikolo trarigardas la senfinajn diskutadojn kaj rezoluciojn pri la senarmigo. Tiujn — domaĝe — plenefike kapablis kontraŭagi la egprofitaj komercaj interesoj de tiu speciala industrio, kiu regas sur same speciala merkato, ververe senlima! Tie tute neglektiĝas la kutimaj normoj kaj leĝoj de la normala merkato. La produktado kaj komercado pri la daŭre modernigantaj armiloj postulas por si la plej vastan merkaton.

La preskaŭ senlimaj profitebloj direktiĝas jam al la „Stela milito", pri kies teknikaj metodoj la aŭtoro prezentas skizan klarigon, tuj demonstrante, kiel „amuza afero" — iluzio — estas atendi (la fanfarone promesitan) moderiĝon de la armila konkurado. Nekontesteble resumas la aŭtoro, ke anstataŭ tio, certe vigliĝos la kurado al la ruiniĝo kaj morto...

Ni ne turnas dorson al la vivgravaj mondaj problemoj, se ni zorgoplene priatentas la perspektivojn kaj problemojn de la jubileanta Eo, kies paca misio estas interkomprenigi la popolojn, firmigi la pacon. Sed kial la socio eĉ post jarcento ne akceptas nian proponon? Edward Simoens klare lanĉas la postulon, denove kritike ekzameni, kuraĝe demandi kaj analizi la bremsojn — sociajn, psikajn k.a. — kiuj malhelpas la vastan agnoskon de Eo (INFORMILO 8., de Flandra E.L.). Nekonataj de ni ili apenaŭ estas, certe; tamen mi devas konsenti kun la aŭtoro, ke estas bezonataj novaj ĝisfunda esplorado kaj multrilataj konkludoj tra libera diskutado. Nur sur tiu bazo eblas kio necesas: ree fiksi la strategion kaj la taktikon de la E-movado, ĉe la sojlo de la postjubilea erao. Do, seniluzie kaj serioze studi kaj priatenti la nuntempajn internaciajn fenomenojn, ĝuste tial, ĉar ili forte diversas en nia tre dividita mondo. Eĉ en la superflue disputita movada disvolviĝo en Afriko.

Multaj homoj intermiksas samseksemon kaj pederastion, kaj gejecon — avertas aŭ eble plendas Gerrit Berveling, diligenta artikolanto en niaj revuoj (MONATO 11.). Prudente informante pri la historiaj aspektoj de tiu sekskultura afero, pri ties mezepoka kristana subpremo, finfine li lasas nin en embaraso. Almenaŭ koncerne la komencan demandon — pri kies socia signifo mi ne inklinas nun diskuti. La „intermikso" restas do plu neklarigita, ĝis eble iu „kuraĝulo" pli penos... (ĉi-verbe prefere mi pasintecon evitos).

El tre fora Perua urbo Chiklayo (Ĉiklajo) venis la nova, tute E-lingve kompostita INKAA POPOLO (1.). Kvankam modeste ilustrita bulteno, tamen videble lerte kaj fervore redaktita, edukas kaj instruas. Mi citas el ĝi la saĝan instigon: „Regi la Internacian Lingvon malfermas la pordojn al universala kulturo!"

Prilingvaj artikoloj — feliĉe, sufiĉe gravaj — salutinde ampleksis la duonon de la jarfina ESPERANTO, kiu ankaŭ aliparte regalis per riĉa enhavo. Ni menciu nur kelkajn bombonojn, kaj nepre la malpli tiklajn. Dum pri-Esperanta konferenco en Tokio diris profesoro Ĉen Juan, ke en Ĉinio — kie troviĝas 56 lingvoj! — oni disvastigas, por funkcii en rolo de enlanda interlingvo, certan parollingvon, nomatan „Putonghua". Oni cetere ne forgesu, ke en Ĉinio ekzistas unueca skribsistemo, la konataj ideogramoj. La interna aplikado de tiu interlingvo tamen neniel retenas la disvastigon de Eo kun la celo kontakti eksterlandanojn — kiel oni bone rimarkis tion okaze de la Pekina UK, eble eĉ pli dum la provincaj ekskursoj, antaŭ kaj post la centra renkontiĝo.

Pluraj artikoloj de la revuo traktas la pli kaj pli urĝan aferon de la terminoj, la terminologion, resp. la kompiladon, proponadon kaj por diskutan registradon de novaj terminoj, prefere per komputilo. Redaktora lerteco tuj apudmetis artikolon pri lingvosciencaj terminoj fare de Akiko Ŭusink-Nagata, japana redaktorino. Ŝi sprite kaj esence prave avertas kontraŭ la grek-latin-maniere — do, ne E-maniere! — kompilitaj (fakte: transprenitaj) gramatikaĵoj (ekz. grafismo, ortografio, volitivo) kaj trudafiksoj, kiel morf-, fon-, krom-, -nim kaj similaj „internaciaĵoj", komprenu: „Eŭropaĵoj".

Ervin Fenyvesi

Intervjuo kun la redaktoro de „Juna Amiko":

Pli ofte, pli regule, pli trafe

La lernejana revuo Juna Amiko lastatempe anoncis sian kontribuon al la Jubilea Jaro. Ĝi estonte aperos kvar-foje jare anstataŭ tri-foje. Ĉar ankaŭ lastatempe nova redaktoro ekoficis, HV starigis al li kelkajn demandojn. La unua temis pri la rolo de Juna Amiko.

Ĝi devus ludi centran rolon en la eduka programo de la tuta Movado. UEA proklamis la intensigon de instruado prioritata inter siaj jubileaj celoj, kaj iniciatis pli intiman kunlaboron kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Fakte, ILEI transprenas de UEA ĝian agadon efektivigi la laboron sur tiu kampo. Ne estas sekreto, ke ILEI estas aparte forte reprezentata en Hungario. La Komitato de UEA en Pekino akceptis rezolucion kiu substrekis la gravan rolon de Juna Amiko kaj tiun takson agnoskas ankaŭ ILEI. Sekve, *Juna Amiko* estas ne nur propra aŭ komerca projekto de HEA; ĝia rolo estas nepre internacia. HEA estas laŭmembre kaj multrilate laŭ administraj rimedoj inter la plej fortaj landaj asocioj de UEA; tial ĝi havas moralan respondecon kontribui aktive al la internacia laboro de la tuta movado. Mi volus loki Juna Amiko centre en tiu respondeco, same kiel jam estas tie lokita la misio aktive eldonadi librojn. Hungario estas en unika pozicio pro tio, ke ĝi kapablas priservi kaj la socialisman kaj la kapitalisman mondojn.

Vi lokas Juna Amiko *centre en la edukaj programoj de la Movado. Bonvolu skizi koncize vian koncepton de tiu programo.*

La prioritataj kampoj estas laŭ mi jenaj:

— Kampanji por akiri permesojn instrui Esperanton oficiale en almenaŭ iuj niveloj de la eduka sistemo sub adekvataj kondiĉoj en tiuj landoj kie ministeriaj permesoj estas ankoraŭ ne akiritaj aŭ bezonataj.

— Prizorgi la trejnadon de sufiĉaj instruistoj por ekspluati la teoriajn permesojn instrui. Ni instruu Esperanton al lingvo-instruistoj konvinkitaj ekokupiĝi pri ĝi, kaj lingvo-didaktikon al esperantistoj dezirantaj instrui. La trejnado ĝuu la subtenon de la edukaj instancoj, en ekz. livero de ejoj kaj iloj por intensaj kursoj kaj oficiala diskonigo pri kursoj en instruistaj fak-gazetoj. Disponigo de faciligoj trejni instruistojn estu inkluzivita en la petoj por oficialigo de Esperanto-instruado. Unu sen la alia estas preskaŭ senutila, kaj la grado ĝis kiu instancoj pretas subteni la instruistan trejnadon estas honesta mezurilo de ilia seriozeco permesi la instruadon entute. Finfine, ĉiu alia lingvo instruata en lernejoj ĝuas ligitan programon de instruista trejnado.

— Liveri adekvatajn apogajn materialojn, helpilojn kaj konsilojn, kaj didaktikajn kaj pri la internaciaj kulturo kaj Movado ligitaj al la lingvo.

— Kompiladi ĝisdatan kaj fidindan registron pri la ampleksoj kaj kondiĉoj de instruado en la diversaj landoj, kiu formu parton de la bazo por perspektiva kajprecipeinternaciaplanado.

— Kontinue klopodi krei respondojn al la demandoj de lernantoj „Kial mi entute lernu la lingvon" kaj „Kiel mi povos utiligi la lingvon, fine de mia kurso".

La plej akutaj el la supraj punktoj estas laŭ mia juĝo la dua kaj la lasta. Kvankam *Juna Amiko* plej evidente apartenas al la tria punkto, ĝi povas ludi utilan rolon en la plenumo de tiuj du plej gravaj punktoj.

Bone, jen la kadro por la revuo, kion pri la enhavo de Juna Amiko?

Unue, ni celas vere internacian etoson, stilon kaj enhavon. Ĝi estu leginda kaj uzebla en ĉiu mondparto. La plimulto de niaj legantoj nuntempe troviĝas en socialismaj landoj — sekve ankaŭ la plimulto de la kontribuantoj. Sed mi mem kontribuasenne-modestajkvantoj al la revuo, kaj kvankam mi klopodas esti maksimume internacia, neeviteble miaj eroj spegulas brit-novzelandecan aŭ okcidentan aliron al lingvo-instruado. Tio portos iom da ekvilibro, kiun suplementos la kresko de okcidentaj kontribuantoj, kiu sekvos la iom-post-ioman rekreon de la abonantaro en okcidentaj landoj. Post la financa fortigo rezulte de tio, HEA kuraĝos proponi la revuon al evoluantaj Esperanto-Movadoj en Azio, Afriko kaj Latin-ameriko je pli favoraj kondiĉoj, tiel ke ankaŭ de tie ekfluos kontribuaĵoj.

Vi skizis la devenon de la artikoloj, sed pri la enhavo mem...?

Ni konservos la konatan varion — artikoloj, rakontoj, enigmoj, leteroj de legantoj, kantoj kun muzik-notoj, poemoj — fakte kontribuaĵoj ne mankas, ili alvenas regule. La artikoloj nur malofte estos pri Esperanto mem, tiuj kiuj ja aperos, koncentriĝos pri praktikaj manieroj utiligi la lingvon, ekz. pri kongresoj, Pasporta Servo, korespondado ks. Ni volas direkti la emfazon iom for de fabeloj kaj historiaĵoj kaj pli emfazi la uzon de la lingvo en praktika moderna komunikado. Iuj rakontoj, precipe tiuj de mia propra plumo, estos pli didaktike strukturitaj; kvankam la legantoj ne nepre rimarkos tion, la instruisto scios trafe ekspluati tion. En tiuj rakontoj, sprito kaj humuro ludos centran rolon. Ni aperigos regule skeĉojn aŭ teatraĵetojn en simpla lingvaĵo, por maksimume stimuli konversacion kaj paroladon. Ni aldonos instrukciojn per kiu grupo kaj instruisto povos mem starigi sen-tekstan liberan dialogadon. Tiu uzo de rol-ludado estas nuntempe vaste kaj sukcese uzata en naci-lingva instruado. En Budapeŝto mi mem plektiĝas en la kreskanta instruado de la angla lingvo — lingvo gramatike koŝmara, idiotisme labirinta, ortografie perversa kaj prononce harelŝiriga. Tamen, mi ne povas eviti konfesi, ke oni multkaze ĝin sukcesas instrui same efike kaj rapide kiel ni Esperanton. Konsentite, motivigo ludas ŝlosilan rolon tiurilate, sed ni devus esti pretaj mem uzi la konversaciigajn, rol-ludajn, strukturgramatikajn metodojn, kiuj portas al ili tian sukceson. Ni esperas en *Juna Amiko* prezenti iom el tiuj metodoj, adaptitaj al la unikaj avantaĝoj, kiujn la logikeco kaj simpleco de Esperanto proponas.

En *Juna Amiko* mem ne eblas aldoni pli ol la plej koncizajn didaktikajn klarigojn, sekve aperos en la revuo de ILEI *Internacia Pedagogia Revuo* du artikoloj (en numeroj 2 kaj 3 de jarkolekto 1987), unu kiu klarigas kiel uzi verkitajn skeĉojn por sproni spontanan konversaciadon, kaj unu kiu klarigas kiel tion ekigi per rol-ludado. La artikoloj uzas kiel ekzemplojn skeĉojn jam aperintajn en *Juna Amiko*; tio ja substrekas la kunlaboron kaj reciprokan subtenon inter *JA* kaj ILEI.

Ekde 1987 la revuo aperos kvarfoje jare; laŭ kiu ritmo?

La unua numero sub mia redakto, numero 86/3 aperis en novembro 1986. Numero 87/1 kun ĉefartikolo „Jubileo pro junulo" transiris al la presejo — iel simbole — en la Zamenhofa tago (Dec. 15.) kaj aperis februare; 87/2 estas finplanita, en Prago nia desegnisto diligente plumumas, ĉio estos frufebruare transdonita, cele al aprila distribuo. Poste sekvos paŭzo ĝis septembro pro la lernejaj ferioj en la plimulto de konsum-landoj. La numeron 87/3 ni pretigos ĝis julio, lasante kvinon da paĝoj por raportoj de la jubileaj kongresoj. La kvara numero aperos en novembro. Tiel aspektos la jara ritmo.

Juna Amiko estas revuo kun longa sed varia historio; iam ĝi havis eldonkvanton de 5000. Kiel ĝi nun statas, kaj kiel vi kaj HEA planas bonigi ĝian estontecon?

Efektive, ĝi estas nun presata en nur 2800 ekzempleroj, el kiuj ŝajne malpli ol 2000 estas fakte abonataj. La revuo estas deficita — dum ĝi devus esti bela enspezigilo. En la lastaj jaroj la abonantaro en okcidentaj landoj iĝis praktike nula pro malregula aperado kaj ekspedaj misoj. Necesas rekrei fidon pri la akurateco kaj liverado, samtempe kun enhavaj modifetoj kaj pliigita ofteco. Gazeto por junaj lernantoj devas esti regula amiko kaj akompananto en la lernado — el multaj landoj instruistoj kaj infanoj pledis por pli ofta aperado.

Sed pli ofta aperado ne solvas ĉiun problemon. Kion pri la reguleco?

La gazeto suferis laŭ la proverbo „tro da kuiristoj difektas la supon". Ĝi devis pasi tra tiom da diversaj fakoj; ĉiu aldonis sian prokraston — la eta amiko estis ofte flankenŝovita pro pli „grava" revuo, pli bezonata libro, iu pli enspeziga ekstera mendo. Kongreslaboroj en 1983 intervenis, kiel ankaŭ la komputiligo de la administrado. Plie, la posedantoj de la diversaj manoj tra kiuj ĉio devis pasi ĝenerale ne sentis emocian aŭ moralan ligon al la revuo. Tion sentis la redaktoroj, kiuj ĉiam ĝustatempe kaj taŭge pretigis la manuskriptojn, sed povis poste nur ĉagreniĝi kaj seniluziiĝi pro la prokrastoj. En iu momento la pli-ol-jara prokrasto estis rekaptita en orgio de diligenteco — dek numeroj aperis ene de dek du monatoj — sed ĝis tiam la distribuado paneis, tiel ke abonantoj multlande imagis ke jam de 1985 la revuo ĉesis aperi. Sed fakte ĉiu numero en la regula serio aperis. La revuo nun estas ĝisdata.

La solvo estas recentrigi la prepar-laborojn; la redaktoro ne nur redaktu sed ankaŭ mem faru la teknikajn prepar-laborojn — komposti kaj enpaĝigi ĉion. Tio estas fakte nur unusemajna laboro. Se la redaktoro estus ankaŭ artisto, centriga efikeco estus kompleta. Feliĉe la gazeto ĝuas delonge la kunlaboron de profesia ĉeña desegnisto, Pavel Rak. Liaj desegno-filmoj foje aperas en la hungara televido — serĉu la nomon ĉe „Esti mese"! Ene de monato venas la desegnaĵoj, dumtempe la responde-

ca redaktoro, Judit Schiller estas trarigardinta ĉion. Malkiel antaŭe, la rego super la pretigo restas ĉe la redaktoro ĝis prespreteco, kaj daŭras unu monaton anstataŭ meze ses sub la mult-kuirista metodo. La plakfarado, presado kaj bindado persiste daŭras 8 ĝis 10 semajnojn (devus sufiĉi du). Post tio sekvas la distribuado, kiu estas almenaŭ iugrade superrigardota de la redaktoro.

Ja, ĉio vanas, se la distribuo ne funkcias. Kio problemas tie? Unue pri la abonoj el ne-socialismaj landoj. Pri tiuj nenio problemas krom ilia malmulteco. Tiujn ni traktas rekte en la sidejo de HEA, kaj la redaktoro tenos duplikatajn listojn kaj persone superrigardos kaj duoble kontrolos ĉiun ekspedon. Nia ĉefa peranto estas UEA, kie la prezo estas 8,40 gld. por jar-kolekto. Pluraj el la landaj perantoj de UEA akceptos abonojn en la loka valuto. Kromaj perantoj estas en Belgio (FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen; 130 BEF) kaj en Britio (P. Hewitt, 28 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, Sth Humberside, DN36 5RT; aŭ 2,80 pundoj). Se oni mendas 8 abonojn aŭ pli ĉe la sama adreso, ni donas rabaton jene: po 7 gld, 110BEF, aŭ 2,30 pundoj. Pli ol 30 ekz.: po 6 gld, 100 BEF, L 2,00. Ni serĉas pli da perantoj.

Nun pri Hungario. Ĉirkaŭ 3200 personoj lernas Esperanton en lernejoj ks, 2000 en elementaj lernejoj. Skandale estas do, ke eĉ ne 200 abonantoj por *JA* troviĝas! Por mendi unuopan abonon oni sendu la abonprezon al HELIR (Hirlap-előfizetési és Lapterjesztő Iroda, 1900 Bp). Sur la rozkolora enpagilo nepre skribu hungare la destinon de la mono (Juna Amiko folyóirat előfizetés, 1987). Ĉe pli grandaj poŝtoficejoj oni povas aboni, petu „hírlapjegyzék", trovu ĝin en tiu katalogo kaj montru al la deĵoranto. Sed...! Kvankam ni en oktobro ricevis permeson oftigi la revuon, eĉ 4 monatojn poste la poŝto ne agnoskas tion pro manko de iu dokumento, kies akiro estis fuŝita pro unu miskalkulita cifero en la petformularo. Poŝtoficejojdoankoraŭ nun akceptas nur 30 forintojn por tri numeroj; eble ĝis jarkolekto 1988 la burokrataĵoj finmisos. Hungaroj rajtas pagi ĉe la poŝto donacabonojn por eksterlandanoj — bonega

(Foto de Z. Fejér)

donaceto. Por tri numeroj tio kostas 36 anstataŭ 30 forintojn. Neniu tamen kuraĝas aserti, ke anstataŭ 40 forintoj por kvar numeroj, la kosto iĝos 48 forintoj. Armita nur per la fragila argumentado de logikeco, kuraĝu foje provi pagi 48 forintojn por donacabono, kaj raportu al ni kio okazas! Pri ĉiuj obstakloj mendi perpoŝte bv. informi nin, ĉar ni volas taksi la efikecon de tiu sistemo. Unuopaj ekz. de JA estas aĉeteblaj en deko de ĉefaj gazetvendejoj (Skala, Sugar ktp.) tra Budapeŝto, ankaŭ en la asocia butiko.

Ni proponas al hungaroj, precipe instruistoj, kolektivajn abonojn, ekde 8 ekz. al unu adreso ni donas rabaton de 10%. Ekde 30 ekz. 15%. Tiujn abonojn ni ekspedos mem de la HEA-oficejo. Ni baldaŭ sendos specimenan ekzempleron kun pagilo al ĉiuj instruistoj registritaj ĉe HEA. Se iu alia deziras mendi kolektivan abonon por 1987 aŭ ne sukcesas aboni tra la poŝto, bv. skribi al HEA pri tio senprokraste.

Pri la ceteraj soclandoj eĉ pli komplike estas. Principe eblas el Bulgario, Sovetunio kaj ŝajne Ĉeĥoslovakio mendi ĉe la enlanda poŝto, kiu peras la mendon tra la hungara agentejo „Kultura". Por Bulgario la nunaj troviloj en la katalogo estas vicnumero 8536 kaj kataloga numero 25423, sed tiuj ŝajne ŝanĝiĝas ĉiujare. La abonperiodo estas de la 1-a de septembro ĝis la 30a de oktobro principe. Sed praktike estas kvota limigo je hungaraj gazetoj, kiu kutime pleniĝas jam post unu semajno. Do, vicostaru ĉe poŝtoficejo jam fine de aŭgusto por mendi abonon por 1988! Ŝajne ne tre praktika servo. Feliĉe en Bulgario BEA akceptas kolektivan abonon de 200 ekz., do bulgaroj povos peti abonon de BEA. Spite multmonatajn klopodojn ni ankoraŭ ne povas scii de „Kultura" kiom da abonantoj ekzistas en la diversaj landoj. Pri Ĉeĥoslovakio ni volas scii kiel efika estas la perpoŝta mendado, kaj ĉu restas dezirantoj, kiuj ne povas ricevi la gazeton. Tiukaze HEA volonte kunlaboros kun ĈEA kaj SEA pri pera aranĝo. Pri Jugoslavio, Pollando kaj GDR estas neniu ekzistanta aranĝo; HEA volas aranĝi peradon, ĉu tra la Landa Asocio de UEA, ĉu tra la Landa sekcio de ILEI. En Pollando ni klopodos starigi tra Kultura la eblecon vicostari ĉe poŝtoficejo aŭgust-fine, kaj ni jam korespondas kun la ILEI-sekcio pri kolektiva abono. Por Sovetunio Juna Amiko troviĝas sur la listo de akcepteblaj gazetoj, sed la perado ĉiam estas iom necerta. Signifa parto de nia nuna legantaro troviĝas tiulande, ili estas la plej reagemaj.

En aprilo okazos la konsultiĝo inter la soclandaj asocioj. Necesas tie konstati la limigitan utilon de la perpoŝta abonado kaj establi simplajn, klarajn manierojn ĝustatempe peri abonojn kaj zorgi pri enlanda distribuo. Ni celas ne nur krei perspektivan aranĝon funkciigeblan ekde 1988, sed ankaŭ tujajn interkonsentojn por permesi liveron de la jarkolekto por 1987.

Do, multaj problemoj restas ankoraŭ solvataj.

Jes, sed paŝon post paŝo ni superas ilin. Ni, kiuj kredas je la bezono kaj utileco de lernejana revuo, konstatis, ke ni devas regi kaj konstante rekontroli la tutan prepar-procezon, de unua verkcela krajonlevo ĝis la lasta poŝtmarkleko, ĉar paneo je iu ajn paŝo senvalorigas la tutan entreprenon.

Kiu interesiĝas pri *Juna Amiko* petu de HEA specimenan ekzempleron. Kiu ĝin abonis kaj ne bonorde ĝin ricevas — tuj plendu al *JA* per la adreso de HEA. Mi persone esploros la mankon. Nur per viaj protestoj ni igos la distribuon „nigra-tru"-imuna.

Edukado estas investo en la estonteco. Ni riskas pli kaj pli postresti en la inunda fluso de fremdlingva instruado tra la mondo. *Juna Amiko* povos esti potenca rimedo por preventi nin droni en la maro de postresto, sed anstataŭe rajdi sur la ondoj de sukceso kune kun la aliaj.

Jiří Karen

REGIMENTO DA ZORGOJ APERIS SURHORIZONTE

Eĉ se luno funebre febra
en mano lumlampeton
forte premis
ni frostegis tamen
ĉiuj
Aŭtuna suno jam denove
brilis surhorizonte
Al ni estis klare:
niaj papilioj evidente
jam neniam ekvidos sunon
(Acide nematuraj fruktoj
teren faladis
desur brancoj)

Kaj tamen vera vivo
ĉapelon enmane havis
kaj ĝin turnante gaje
en aŭtuna suno
nur pri estonta brilo
parolis

Szilárd Bálint

ERARA KONEKTO

La edzino de s-ro Simon kuŝis en hospitalo, lia aŭto estis en riparejo. Frumatene li volis voki la kuraciston, sed estante tre nervoza, li tute konfuzis la telefonnumerojn.

— Alo! Ĉi tie estas Simon... kiel fartas la paciento?

— Dank' al dio, ni plenumis la grandan laboron. La tuta interno estis eluzita, ni devis ripari kaj parte ŝanĝi ĝin — sonis la respondo.

— Kara sinjoro, bonvolu ne diri stultaĵojn!

— Nenia stultaĵo! Ĉu vi ne rimarkis, ke la piŝto malstreĉe funkciis, kaj malrapida estas la impulsa ritmo... eĉ la gvidakso kurbiĝas dum funkciado?

— Vere, ĝi estis jam delonge loza...

— Kaj domaĝe, vi uzis malbonan gumon ĉe la enkonduka tubo...

— Eĉ tio! Mi tute ne atentis tion...

— Cetere, la amplekso de la truo kaj la surfacaj eluziĝoj lasas konkludi, ke vi ne ŝmiris ĝin sufiĉe.

— Terure! Vera ĉagreno... kaj nun?

— Ĉagreniĝi tamen vi ne devas. Kun granda peno ni reordigis la malnovan skatolon!

— Malnova skatolo? Sed sinjoro! Bonvolu...

— Jes, kiel vi diras. Bonvolu konfesi, kiam vi fianĉigis vin kun tiu malnova skatolo?

— Ankoraŭ en 1938.

— Nu, same mi pensis. Kaj kiomfoje vi ŝovis tiun skatolon?

— Ja, ja, tamen bonvolu ne titoli skatolo!

— Kaj ni kiomfoje ekŝovis, premis, puŝadis, klopodis ĝis kiam ĉio reordiĝis...

— Ĉu vi!? Sed kial?

— Kara sinjoro, ni devis ŝovi antaŭe kaj dorsdirekte... dume iu konstante blovis la dorsan truon, ke la tubo lasu la aeron...

— Sed tio estas terura! Kio devigis vin...?

— Ĉar refluis la enverŝita likvaĵo. Kaj ĉu vi ne rimarkis, ke via pantalono iĝis glueca?

— Vere... multfoje.

— Ankaŭ la dorsan ellasilon ni tute purigis.

— Oh, mia kompatinda! Kaj kial?

— Ĉar ĝi estis fuminta.

— Ŝajnis ankaŭ al mi...

— Mi devas denove ripeti, ke via piŝto ne funkcias bone. Bonŝance por vi, la niaj estas eminentaj, almenaŭ dek personoj elprovis la funkciadon... dum du horoj kun kun plezuro ni faris ĉion. Do vi jam povos hejmenporti la rezulton, kiu jam estas konvena por vi! — diris la riparisto kaj demetis la aŭdilon.

S-ro Simon kapturniĝis, rabia kolero ŝveligis lian bruston. Tiu hospitalo estas vera buĉejo kun sadismaj kuracistoj! Haste li petis konjakon en la proksima bufedo, kaj haste kuris al la hospitalo.

— Kie mi trovos la ĉefkuraciston? — li akre demandis de la pordisto. Vane li frapis, la ĉambro estis fermita. Sed venis flegistino, kiu informis, ke la ĉefkuracisto laboras en operaciejo, nun ne eblas paroli kun li. Mi atendas — diris Simon, kaj aplombe sidiĝis en la koridoro, ekfumante cigaredon.

— Estas malpermesate fumadi ĉi tie! — atentigis lin alia flegistino. Simon mallaŭte sakris, kaj kolere eniris la necesejon. Ensidante tie malantaŭ fermita pordeto li fumis cigaredojn unu post la alia.

Post unu horo la ĉefkuracisto finfine akceptis lin. Kion vi deziras tiel urĝe? — li demandis de Simon.

— Sinjoro direktoro, mi devas forte protesti kontraŭ tia traktado, kiun vi faras en tiu hospitalo!

— Kion ni faras? Mi ne komprenas.

— Ĉu vi ne komprenas? Ĉi-matene ĝuste vi rakontis al mi telefone, kian torturon vi faris al mia edzino!

— Mi tute ne parolis kun vi per telefono!

— Se ne vi, tiam alia via kuracisto!

— Diru lian nomon.

— Mi ne demandis, ĉar mi ege indignis, kiam li nomis mian edzinon maljuna skatolo!

— Tute ne eblas! Niaj kuracistoj estas ja ĝentilaj homoj!

— Ĉu ĝentilaj? Do ili ĝentile perfortis dekope eĉ dum du horoj mian edzinon!?

— Sinjoro! Vi ne estas normala! Flua mensogo... De kie vi prenas kuraĝon tiel kalumniii nin?

— Ĉu mi mensogas? La telefonanto eĉ diris pri mia vira kapablo, ke ĝi ne estas bona! Pro tio ili devis ripari kaj elprovi tiun truon de la paciento... — kriis Simon laŭte.

La ĉefkuracisto vidis, ke temas pri frenezulo... Aparte

ĝentile li turnis sin al Simon:

— Mi tuj ekzamenos vian plendon! Mi plene komprenas vian koleron, sinjoro... restu trankvile en tiu fotelo, mi ekscios tuj kiu estis tiu aĉulo, kiu primokis vin... bonvolu atendi!

La direktoro rigardis la edzinon, kiu fartis bone. Sen perdi la tempon, li tuj telefonis al la frenezulejo, kaj pasis apenaŭ kvaronhoro, kiam alvenis du blanke vestitaj fortuloj. Vane Simon protestis kriegante, li ricevis frenezjakon sur sin, kaj estis rapide forportita...

La sekvan tagon Simon estis ankoraŭ iom narkotita pro la trankviligiloj injektitaj, tamen li jam povis doni raciajn respondojn.

— Kion vi faris hieraŭ? — demandis la psikiatro.

— Mi telefonis al la hospitalo kie mia edzino kuŝas, kaj de tie mi ricevis krudegan respondon. Ke mia edzino estas malnova skatolo, ke ili elprovis sekse ŝin kaj tiel plu! Mi iris al la hospitalo, tie mi interkverelis kun la ĉefkuracisto.

— Per kio vi veturis al la hospitalo? Precize diru!

— Mi devis veturi per aŭtobuso, ĉar mia aŭto troviĝas ĉe riparisto — respondis Simon post iom da pensado.

— Diru al mi lian telefonnumeron!

Kaj la riparisto rakontis al la psikiatro kion li interparolis kun Simon. Evidentiĝis la vero pri la malnova skatolo, do pri la aŭto...

Kiam la psikiatro adiaŭis la libere forirantan Simon, li ridante menciis:

— Se ĉiu diagnozado estus tiel facila, kiel ĉe tiu miskompreno!

Tamen la afero daŭris plu. La ĉefkuracisto ekprocesis kontraŭ Simon pro honorofendo, Simon siavice kontraŭ la ĉefkuracisto pro senrajta malliberigo, eĉ kontraŭ la riparisto pro intenca erarigo. La juristoj longe diskutis pri tiuj...

* * *

Kara Leganto! Kiel vi solvus tiun aferon, sufiĉe strangan? La plej bona solvo — en 30 linioj— aperos en Hungara Vivo kaj ricevos libropremion. Limdato: du monatoj post la alveno de tiu ĉi rakonto.

DAŬRIGO

de la novelo

KAMIONISTA AVENTURO

Aperinta en la numero 1986/4

Daŭrigas:

Ladislav Podmele, Prago, CS

Kiam Joĉjo, la kamionisto vizitis la hejmon de Agota laŭ ŝia deziro, ŝi baldaŭ komencis rakonti pri sia soleca vivo. Kiel mi jam diris en via kamiono — ŝi memorigis — mi estas lutistino, simpla laboristino en radiofabriko, kie troveblas preskaŭ nur virinoj. Ofte ili kverelas kaj ĵaluzas, okazas intrigoj, do la atmosfero ne ĉiam estas bona. Viroj mankas, kaj se iuj tamen venas, mankas inter ili fraŭloj. Mi rpovas eskapi de tie biciklante, mi ege ŝatas sportadi. Mi ricevis lokon en la Balatona ripozejo, kaj — denove nur virinojn mi trovis tie...

Mi ne volas mensogi al vi — ŝi daŭrigis post mallonga silentado. — Mia amanto bedaŭrinde aĉe trompis min. Sekrete li havis aliajn tri amatinojn, dum mi devis kredi pri liaj laboroj province... Sed mi revenu al Balatono, kie mi preskaŭ karambolis. Vi, Joĉjo, estis tiom helpema, vi tuj kuris al mi kaj vi montris intereson pri mia persono kaj vivo. Ĉiam rigardeme vi aŭskultis min. Klaris, ke vi serĉas seriozan virinon. Kaj vi parolis pri edziĝo, ne nur pri amindumo kiel via kolego Karlo.

Dum vi iris alivesti vin, Joĉjo — ŝiaj vortoj iĝis tre mallaŭtaj — Karlo kaptis mian brakon preskaŭ perforte. Certe, la energio plaĉas al virinoj serĉantaj amoron, sed ne al mi. Li tiris min al arbustoj, kaj insistis seksumi! Nurnure tion! Mi kriis proteste, ja mi volis nur bani min. Sed li ne scias naĝi, li diris, do mi banis min sen li. Naŭziĝinte, mi ekignoris lin! Mi skribis al vi leteron, dezirante iam interparolon kun vi. Mi forkuris de tiu loko, sed antaŭe mi postulis, ke li transdonu la leteron al vi. Sciu, ke mi ne estas kokidineto, sed memstara kaj sincera, jes, serioza virino, kiu serĉas viron, kunulon por sia vivo. Honorindan kaj respektplenan viron mi atendas... kaj vi ŝajnas esti tia, Joĉjo, — ŝi varmokule rigardis lin, ĝis...

La amrilatoj estas pli komplikaj ol pri tio eblus rakonti mallonge — sed mankas pli da spaco ĉi tie...

ESPERANTA KATALOGO

La Sverdlovska publika biblioteko „Belinskij" estas la plej granda kaj riĉa biblioteko en Uralo. Ĝi posedas ĉ. tri milionojn da volumoj, kaj la kvanto plu kreskas; ja la biblioteko ricevas devigan ekzempleron de ĉiu ruslingva libro aperanta en Sovetio kaj nemalmulte da alilingva literaturo.

En la fremdlingva fako de la biblioteko estas loko ankaŭ por literaturo en kaj pri Esperanto, kiun volonte uzas la lokaj esperantistoj. Inter la Esperantaj libroj, kies stoko ampleksiĝas dank' al aĉetoj kaj donacoj, estas verkoj de L. Zamenhof, V. Devjatnin, E. Bokarev, M. Isajev, A. Sanarov, V. Sutkovoj, E. Drezen, I. Nemere, tradukoj el L. Tolstoj, W. Shakespeare, N. Gogol, I. Turgenev k.a., lernolibroj, vortaroj, socipolitika kaj faka literaturo. Por pli bona orientiĝo fine de 1985 estis aperigita 10-paĝa katalogo de la Esperanta kaj interlingvistika literaturo de la biblioteko Belinskij kun datumoj pri iom pli ol 100 volumoj. Dezirantoj ricevi la katalogon skribu al Halina Gorecka (SU-620145 Sverdlovski-145, P. O. Box 287, USSR-CCCP), kiu volonte korespondus kun interesitoj pri bibliotekaj, bibliografiaj kaj librohistoriaj temoj.

Aleksander Korĵenkov

Edwin de Kock

KONFLIKTO DE LA EPOKOJ

Libro 3

Ĉapitro III

En la moderna lando Israel',
resaniĝanta post la mismastrumoj
de du jarmiloj, ĝibas sudaj holmoj
kun kalvmakuloj kaj krania nudo.
Sed unuloke ravas, fervojraŭte —
inter Jerusalem kaj Tel-Aviv —
Edenrubando. Tie la vekiĝo
en frua jaro antaŭ la Sinjor'.

Mildaj momentoj inter la herboj —
verde odora, senĉesa nun';
briz' apenaŭa kulmojn karesis.
Super krutaĵoj pendis la sun'.

Dialekton jam longe arkajan
kontraŭ ŝtonflankoj zumis la roj'.
En la rebrilon rano eksaltis.
Tegis valkurbon matena ĝoj'.

Kaj tiam mi ekaŭdis la piedojn
ŝugrince sobglitantajn laŭ deklivo,
ĉe mia dekstro. Kurtan ŝtonoĵeton
for la figuro haltis. Vesto blanka
super menoro: la arbedo flave
flametanta en multincensa Maj'.

„Saluton! Ĉu la dormo 'stis agrabla?"
Per sana viglo, senceremonie,
li paŝis pli apuden, por eksido
sur ŝtona bret'.

Mi suprenbrakis min,
kun la printempoplena kap' ankoraŭ
beltrance, kvankam ne sen scivolem'.

„Jes, dankon. Eĉ pli agrablis la vekiĝo
en paradizopeco. Vi, mi supozas,
estas por mi la tria kondukonto
tra silikejoj de la historio,
sur kiuj nun mi devos knari plu
al dista fino — tamen ĉu kun celo
Mi ne kapablas vidi tra l' obskuro
fro vintrofajroj, fume ventblovata
trans nigrigitan stepon de l' animo."

„Celo troviĝas. Kiel nun, ĉi tie,
la tutan mondon kaj la kosmon mem
transondos iam helfarba primaver'.
Jes, ankaŭ vin! Ne pensu tiel vintre.

Sed jen unue mi prezentu min:
Ezra. Min naskis Babilon', ĉe plaŭdoj
Eŭfrataj, kiujn amis Abraham
kaj la Princino. Ĉiam poste ŝi ilin
ne povis en la kor' ne aŭdi plu.

Tien Nebukadnecar al ekzilo
ĉenitajn, sune kaj tra polv', retrenis
inter soldatmokantoj la rompitojn
kun pensoŝarĝ', silenta ploro, preĝoj
el rubamas' kiu estis Jerusalem.

Do iuj el ni stucis la radikojn,
por ne tro kreski en la aluvion
de la rivera region' fekunda.
Kaj mi brulkore, jam fro l' infaneco,
pridemandadis ĉiun maljunulon
kaj feniciajn tekstojn riĉmemorajn
de niaj pergamenoj, pri kialoj
por ĉi kolapso. Kiel vir' kaj pastro
mi krome faklertiĝis, kolektanto
de la verkaĵoj kiuj estis ni
dum la jarcentoj antaŭ tio, kun
esper' perdita pro la fuŝaj reĝoj,
profetbaraktoj kaj malmulta glor'
en lando nun lontana — mem farante
librojn pri ĝi. Sed pleje mi revadis
vojiri kun la jubilantaj Judoj,
kiam piedojn pie replaŭdantajn
tra polvo sub la pikradia sun'
revokos en Jerusalem la Rok'
altara, fro kiu devis suprenfumi
al Dio ofervoĉoj de l' popolo.

Kaj tiel estis. Poste mia korpo
nutretis nian magriĝintan landon."

Tim' asegajis. „Tamen vi pluvivas,
fantomo — e... spirito — ĉu?"

Suspire
la ŝultrojn li faligis. „Superstiĉa
ankoraŭ! Post la mort' la cerbo putras
unue, kun memoroj pri la memo.

Tial, pro nekonsci' kompleta, longe
mi ne ekzistis kiel mi. Jarcentoj
kun homtumulto kaj la multfaremaj
tagoj por mi ekestis, resolviĝe,
kiel horloĝtiktako inter du
sekundoj. Ĉar nenion la mortintoj
scias, estante speco de nenio —
kvankam Dipatro, kiu postsopiras
Siajn infanojn, ili mensoŝranke
konservas, zorge: registritajn memojn,
por repaterni ĉies personecon
en la mateno de la releviĝo."

„Sed tio estos ĉe la mondofin'!"

„Ne nur. La sanktan paĝon vi ja legis —
ĉu ne? — pri la momento ĉe la kruco
kiam, post tenebriĝo, de Mortinto
la kontuzita kapo brusten falis,
kaj fundamentoj sub la mond' abrupte
skuiĝis, kaj poste rearanĝis sin
por nova homebleco."

„Kompreneble.
Mate' bildigis ĝin filmece."

„Ankaŭ,
ke forŝoviĝis polvaj terlitaĵoj
en la tombejo kontraŭ l' Olivmonto,
kie jam tiutempe tiom dormis;
kaj kiam Li deskuis la katenojn
de l' morto en ĝardenkaverno, multaj —
rekorpiĝinte (ho surpriz'!) — sin levis
kaj ĉirkaŭmarŝis en Jerusalem
kaj miris tra la tuta Palestino.

Sed kvardek tagojn poste, kiam Li
dum blučiela ĴaŭdO preter nuboj
sin lanĉis en la spacprofundojn for
al akcepto reĝa far la praurbego,
tiujn Li kun si portis, triumfire:
kaptitojn foje de la mortprizon'
sed jam liberajn nun por viv' senfina —
unuajn garbojn kiuj garantias
rikoltabundon kiam Li revenos.

De ili estis ankaŭ mi, kaj same
ĉiu gvidonto via, krom unu pli.

Sed venu. Tiu sun' jam tuŝas alton
de kie, taglanterno elpendigita
en tenebreja vasto, ĝi prilumos
destinmomentojn kiujn spektos ni."

24.5.1986-7. 6.1986

Fro = de, en certa signifo.

Sándor Rákos
(1921-)

LUDOJ DE CATULLUS
(Fragmento)

Catullus mia morgaŭ je la 17,50
vi havos rektan prezentadon
ĉeestu en la stadiono n-ro 2
se eble je la 5-a jam ĉar
kvankam improvizado sed utilus
antaŭe babiladi pri aferoj
ekzemple pri la versaĵisto Egnatius
kiu kiel vi bone scias
estas amiko de Mentula kaj li
fariĝis pere de li nun potenca
aferŝarĝito pri demandoj cirkaj
ĉu estus ĝuste per kolero via
mencii lin laŭnome ankaŭ nun
ne parolante pri favorato
de la publiko kiun vi fiumis
poeme pri Mamurra virputino
kaj pri Cezaro alta protektanto
de la mamuroj kaj mentuloj kiun
ataki vi ne malhonestis same
(pro tio li verŝajne kontroligos
ankaŭ nun la arenon)
nu ja konsciu ke ankaŭ ni vivas
per mono sekve malsamopinii
kun iu ajn de kiu eĉ panero
nia dependas estus tre-tre stulte
do pri la aplaŭdistoj, biletkontrolistoj
kaj pri iu ajn mecenato
en via (mia nia) intereso
eĉ ne vorteton krome ĉion
vi rajtas fari tutlibere
nenio kaj neniu vin malhelpas
vi rajtas plenkuraĝe kaj trankvile
eldiri ĉion kiam oni
vin puŝos al la sovaĝbestoj
Catullus mia morgaŭ
je la 17.50

Tradukis: Imre Szabó

Marcell Benedek
(1885—1969)

La donaco de la horloĝisto

La patrino de la fianĉino aranĝis la nuptodonacojn sur la tablo. La parencoj kaj amikoj faris sian plejeblon. Troviĝis tie arĝenta manĝilaro por 12 personoj, porcelana garnituro, du japanaj vazoj, tri aŭ kvar dekorobjektoj el bronzo kaj fone kelkaj simplaj, sed praktikaj aĵetoj.

Kiam la nupta gastaro revenis el la preĝejo, la amason de la gastoj trabaraktis stranga, redingote vestita maljunuleto, kiun konis neniun. Li serĉis la junan edzon.

— Mi estas Gross — li diris —, Gross, la horloĝisto. Certe vi ne bonvolas rememori min. Vi ankoraŭ infanis, kiam mi havis aferon en la domo de via karmemora patro. La forpasinto faris almi grandan-grandan servon. Neniam mi povis materialigi mian dankon. Do almenaŭ al la filo mi volus komplezi per io. Permesu al mi transdoni ĉi tiun modestan nuptodonacon, kaj bondeziri alvi.

El la pantalona poŝo li elprenis unu pli kaj unu malpli grandan ujon. En ambaŭ estis po unu horloĝo. En la pli granda: bela ora poŝhorloĝo kun duobla klapo kaj plaĉa, maldika ĉeno. En la malpli granda: virina horloĝeto, same el oro. Ambaŭ estis ankaŭ strečitaj: kun sekunda precizo ili montris dekdu horojn.

En la nuptovojaĝon ili jam kunportis ĉi tiujn horloĝojn. Sian malnovan la edzo donacis al la frato kaj la edzino al la fratino.

En Venecio ili rimarkis, ke la horloĝo de la sinjoro iom rapidas kaj tiu de la sinjorino iom malfruas. La diferenco estis sensignifa, ili ne zorgis pri ĝi. Sed en Florenco ĝi jam kaŭzis ĝeneton: la edzo veturigis la edzinon al la fervojo tri kvaronhorojn pli frue ol necese. Sed faktas: se ili kredas la horloĝon de la sinjorino, ili malfruas al la trajno.

— En Romo mi igos alĝustigi ambaŭ — diris la edzo. — Vere domaĝe, ke tiel multekostaj, belaj horloĝoj funkcias neorde.

La horloĝisto en Romo — kompreninte pri kio temas — pruntis al ili po unu arĝentan horloĝon, kaj promesis ripari la malbonajn. Sed kiam ili reaperis ĉe li, kun embarasita mieno li akceptis ilin.

— Mi jamas horloĝisto depost tridek jaroj — li diris —, sed tian mekanismon mi ankoraŭ ne vidis. Eĉ tuŝi ĝin mi ne aŭdacas. Bonŝance por vi, ke vi turnis vin al mi: aliulo estus ĝin eble fuŝinta. Mi proponas doni ilin por riparo tien, kie vi aĉetis ilin.

En la tria kaj lasta semajno de la nuptovojaĝo la diferenco inter la du horloĝoj jam sumis plenajn unu horon kaj duonon. Sed malgraŭ ke ili sciis pri la misfunkciado de sia horloĝo: elklakinte kaj rigardinte ĝin, ĉiu kredis por momento al la sia. Kaj la edzo nervozis, hastemis, por ke ili ne malfruu al gastiga tablo, teatro aŭ fervojo, kaj la sinjorino ne volonte formovis sin de tie, kie ŝi troviĝis: ja ŝi ĉie fartis bone, kaj ŝia horloĝo montris multe malpli, ol tiu de la sinjoro.

En Pest komenciĝis la ĉiutaga vivo. La edzo estis antaŭtagmeze en la juĝejo, posttagmeze en sia oficejo, vespere plejofte en la partia klubejo; kaj la sinjorino hejme ĉe la patrino kaj en tekunvenoj.

La horloĝojn ili interĝustigis ĉiutage je certa horo. Brava, preciza murhorloĝo en la manĝejo montris la veran tempon. Tamen okazadis, ke matene la edzo timigita forkuris elhejme, ĉar lia horloĝo montris dangere multe.

— Oni jam devus ĝustigi ĉi tiujn horloĝojn — diris la sinjorino. — Kie estas la metiejo de via Gross?

— De mia Gross? Vi scias, ke mi eĉ ne konis tiun homon. Oni devas konsulti adresaron.

La edzino ne domaĝis la penon. Laŭ la adresaro vivas dektri horloĝistoj en Budapeŝto kun la nomo Gross. Ŝi sidiĝis en veturilon kaj vizitis ĉiujn laŭvice. En neniu el ili ŝi rekonis la strangan maljunuleton. Kaj kiam ili rigardis en la mekanismon: ĉiuj balancis la kapon. Tian mekanismon ili vidis neniam.

— Bonŝance por vi — ĉiuj diris —, ke vi turnis vin al mi. Aliulo estus ĝin eble fuŝinta.

Eĉ unu el ili ne kuraĝis tuŝi la horloĝojn. Kaj tiun misteran Gross, la dekkvaran, ne eblis retrovi, nek tere, nek ĉiele.

Kaj la viro ĉiam pli kutimiĝis al la ritmo de sia horloĝo. Li ne plu ĝustigis ĝin al la manĝsalona horloĝo, ĉar malofte li troviĝis en la manĝejo, se jes, ĉiam nur haste, sinpele. Matene li forgalopis frue elhejme; ironte en la juĝejon, li intertraktis en la kafejo kun ĉiaspecaj agentoj. Ankaŭ la kluboj forprenis de li ĉiam pli da tempo, li funkciistie kaj ĉi tie kiel estrarano, sekretario, vicprezidanto; oni diradis pri li, ke li sopiras iĝi deputito.

Intertempe la du horloĝoj renkontiĝis unu kun la alia kaj kun la murhorloĝo manĝeja: ĉiuj tri montris precize la dektrian kun la diferenco, ke ĉe la manĝeja tio signifis tagmezon, sur tiu de la viro la venontan noktomezon kaj sur tiu de la sinjorino la pasintan nokton. Kaj neniu informiĝis pri la renkontiĝo, ĉar neniu troviĝis hejme kaj ne kune ili estis.

La sinjorino estis bona edzino, kaj ankoraŭ tre amis sian edzon. Doloris ŝin, ke li pasigas sian vivon en tiel spirraba hasto, eĉ ripozeti li ne povas hejme, nur rapidas, rapidas, kvazaŭ li timus malfrui al io. Ŝi, kontraŭe, volonte haltigus la tempon: ŝi jam havas infanon, kiu estas nun tiel ĉarma, kiel neniam estos pliaĝe. Jam delonge ankaŭ ŝi ne alĝustigas sian horloĝon al la murhorloĝo. Ĉi tiun oni jam eĉ ne strečas. Por kio?

Sed la horloĝon de sia edzo ŝi malamis. Tiu horloĝo mallongigas jam eĉ la tempon de iliaj belaj, amaj interpremiĝoj. Por ŝi jam noktas, por ŝia edzo ankoraŭ tagas. Unu freŝas, la alia lacas, unu aktivemas, la alia dormemas. Ĉu tio ĉiam tiel estos?

Foje, kiam iliaj noktoj koincidis por kelka tempo, — la horloĝo de la edzo antaŭiris monatojn; sed feliče ĝin montris la monatojn — la virino ellitiĝis nerimarkate, en la mallumo prenis ambaŭ horloĝojn de sur la noktoŝrankoj, eliris la kuirejon kaj plenforte ĵetis ilin kontraŭ la ŝtonan plankon.

Finfine — ŝi pensis en si — mi liberiĝis de vi!

Momenton ŝi staris senmova en la mallumo; nur nun ŝi ekpensis, kion diri al la edzo.

— Ej, ĉu gravas por mi? Li batu min, faru al mi, kion li volas, se tiel karas al li tiu horloĝo... Temas ja pri la feliĉo de nia tuta vivo...

Sed kiam ŝi atingis ĝis tie kun siaj pensoj, ĉiuj sangeroj koaguliĝis al ŝi. En la silento de la kuirejo klare aŭdiĝis la tiktakado de ambaŭ horloĝoj: unu spirrabe rapida kaj unu mola, kvieta klaketado.

— Tiktaktiktaktiktaktiktaktiktak...

— Tik-tak-tik-tak...

Ŝi faris lumon. Ambaŭ horloĝoj kuŝis perfekte sendifektaj sur la planko.

Eĉ eta konkaviĝo ne vidiĝis sur ili.

Ŝi ŝovis la manon en la buŝon, kaj mordis la fingrojn, por ne ŝriki. Ŝi sentis miksiĝi en batalon kun misteraj potencoj — nun ŝi jam estas perdita, ĉio indiferentas —, sed ŝi provos, eĉ se nur pro spito.

Ŝi dekaptis la latunan pistujon el la kredenco, enfaligis ambaŭ horloĝojn kaj surfrapis la pistilon, kiel iam ŝi vidis ĉe iluziisto, kiu poste eltiris la horloĝon el la pistujo nedifektitan, fiere anoncante:

— La spektaklo sukcesis.

La unuan frapon sekvis dua, tira. La bruo de la pistujo alarmis la domon. La servistino moviĝetis en sia kamero, la infano vekiĝis en la ĉambro kaj ekploris. La sinjorino frapis almenaŭ dekfoje sur la horloĝojn kun rabia kolero, kaj kiam ŝi ekaŭdis paŝojn proksimiĝantajn eĉ el du direktoj, ŝi renversis la pistujon.

— Kion vi faras? — konsterniĝis la edzo, kiu elkuris en nura ĉemizo en la kuirejon.

— La... la... spektaklo sukcesis — balbutis la virino kaj falis svene.

La du horlooĝoj montris nenian difekton.

* * *

Nevane la edzo intertraktis ĉiam kun ĉiaspecaj agentoj: videble li riĉiĝadis. Nevane li pasigis siajn antaŭtagmezojn en la juĝejo, posttagmezojn en la oficejo: li iĝis fama advokato. Nevane li vizitadis la klubojn, tablorondojn, kazinojn vespere: li iĝis deputito, poste ministro.

Kaj nevane lia horloĝo rapidis komence minutojn, poste horojn, tagojn, semajnojn, monatojn kaj jarojn: foje li rimarkis, ke li iĝis maljunulo. Sulkoplena, kalva maljunulo kun tremantaj kruroj.

Ĝustadire jam de pli longa tempo li estis sulkoplena, kalva, tremkrura maljunulo, sed ne tuj li rimarkis tion. Dum li estis ministro, li ne rimarkis. Nur eksigita, li rimarkis tion.

Li rigardis sian edzinon, kaj miris, kiom pli maljuna li estas ol ŝi. Ja ili preskaŭ samaĝis. Kaj la edzino ankoraŭ havas brunan hararon, apenaŭ videblajn sulketojn ĉirkaŭ la okuloj, rektan, gracian teniĝon, fieran irmanieron.

Li rigardis, rigardis sian edzinon, larmoj inundis liajn okulojn. Kaj la edzino aliris, brakumis kaj kisis lin, kaj diris:

— StrečU la manĝejan horloĝon, oldulo mia.

La eksministro grimpis sur seĝon, kaj per tremantaj manoj turnadis la strečilon. Estis malfacile. La horloĝo senmovis jam delonge.

— Je kioma mi ĝin reguligu? — li demandis rompite, humile. — Malgraŭ ke la horloĝo klaketis al li en la poŝo.

— Nu, rigardu vian horloĝon — diris la edzino. — Če mi estas ĝuste la dekdua, sed mi ne scias...

— Interese, ankaŭ če mi.

La virino helpis sian edzon desupri de la seĝo. Li hontetis, sed akceptis la helpon, ĉar lia kapo turniĝadis.

Kaj ekde ĉi momento ĉiuj tri horloĝoj iris tiom precize, kiom homfarita horloĝo plej kapablas.

El la hungara: József Kiss Horváth

Unu poemo en du tradukoj

Gábor Garai
(1929-)

SUR LA TRAPEZO

Kiel pinĉilo viva pendas
la viro sur trapeza stango,
inter la dentoj duobla disko
kvazaŭ ĝi estus magnetlango.

Transapoluse rotacias
streĉitabuŝe la virino!
Ho, kia kiso! — Meze nuda,
silenta denso, mortolimo.

Ho, svingas kia solidaro
sin subĉiele-supertere;
kia pasio blinde lerta
du vivojn riskas savlivere!

Kiel atente, sinregante
kunfluge ili du akordas
sciante: unu se mistrafas,
subfale ambaŭ ili mortas!...

Ho, se ni tiel nin kuntenus,
interkonfidaj geamantoj,
kvazaŭ senĉese suprenfluge,
kvazaŭ ekfale sen kunfandoj!

Se ni plenume niajn kunajn
farojn nin intertenus same
vivokonfide al la dentoj
kaj nervoj de l' kunul' ĉiame!

Kroĉante nin al miloj, se ni
plenfide dirus, kion nure
travivas ili: la kuneco
plenkoncernas vivsature!...

Sin turnas, turnas la virino
inter la dentoj de la viro —
tambura bru'. Rapida fino
necesus, solvo el deliro.

Ĉu nin!?... Finiĝas la spektaklo.
Aplaŭd' sin svingas kurteneska.
Kaj ili staras jam malsupre:
skulptaĵ' de kompliment' groteska.

El la hungara tradukis Imre Szabó

GEAKROBATOJ

Pinĉil' vivanta — pendas supre
inverse sur trapezo: vir',
turndiskon tenas inter dentoj:
„magnetan langon" — kun inspir'.

Sur la poluso transa giras
virin'. Ho, kia kisa sort'!
Ja inter ili estas sole
spacet', silent', — hazarda mort'.

Solidarec' mirinda pendas
ĉi tie inter ter', ĉiel',
du vivojn riskas, savas sperte
aŭdaca vol', komuna cel'.

Disciplinite ili giras
singarde, arte kun atent',
ja scias: eraret' sufiĉus —
defalus ambaŭ en moment'...

Se nur ni tiel solidarus
amantoj en fidela am',
malsupre, supre en la vivo
se flagrus en ni tia flam'!

Se ni, agantoj de komunaj
aferoj, tiel — sen perfid' —
kunigus unu la alian
kun tia ĉi fatala fid'!

Se ni — al miloj aliĝantoj —
simile sentus en anim';
kunul', afero, sorto viaj
koncernas tute ankaŭ min!...

Kaj giras pere de la dentoj
tenata cirk-akrobatin'.
Muzik', tambur' softiĝas — nun
jam devus esti ia fin'.

Jen!... La spektaklo alteriĝis.
Aplaŭdo muĝas, kiel vent'.
Malsupre ili staras, kvazaŭ
skulptita stranga kompliment'.

Trakudis: Julio Varga

LIBROVENDADO — 1986

En la n-ro 5/1986 de Hungara Vivo aperis statistiko pri la vendorezultoj de HEA dum 1985. Nun laŭ samaj kriterioj estas kompilita la listo pri 1986.

La jena statistiko enhavas ĉiujn proprajn eldonaĵojn de HEA, kiuj vendiĝis dum la jaro 1986 en pli ol 20 ekzempleroj. Ĝi ne enhavas la eldonaĵojn de la Komputista Grupo de HEA, sed jes tiujn de SEC, kiujn posedas nia libroservo. Post la titolo staras parenteze la eldonjaro, kaj ĉe libroj aperintaj en 1986, ankaŭ la monato de la enmerkatiĝo. Kompreneble, la statistiko enhavas ĉiujn vendojn, do ankaŭ tiujn al aliaj libroservoj.

La suba listo ne estas nura komerca raporto: ĝi fidinde respegulas la pretendojn, preferojn, bezonojn kaj guston de la esperantistaro, kaj kapablas disblovi legendojn, originantajn el neinformiteco.

1. Princz O.: Eszperantó nyelvkönyv (1984) 3929
2. Benczik V.: Baza legolibro por komencantoj (1986, okt.) 1441
3. Twain, M.: La aventuroj de Tom Sawyer (Bildrakonto, 1981) 1173
4. Mikulás, J.: Taskfolioj por komencantoj (1983) 1104
5. Gárdonyi, G.: Steloj de Eger (Bildrakonto, 1980) 1086
6. Lienhardt, A.: Amuzaj dialogoj en Eo (1980) 1019
7. Nemere, I.: La Monto (Orig. romano 1984) 993
8. Auld, W.: Paŝoj al plena posedo (1983) 866
9. Seppik, H.: La tuta Esperanto (1984) 801
10. Lorjak: Mariagnes (Orig. romano, 1986, sept.) 794
11. Nemere, I.: Alta akvo (Orig. romano, 1986, febr.) 681
12. Lorjak: Eŭlalia (Orig. romano, 1984) 623
13. Nemere, I.: La fermita urbo (Orig. romano, 1982) 590
14. Nemere, I.: La naŭa kanalo (Orig. noveloj, 1982) 588
15. Baghy, J.: Gramatika demandaro resuma (1982) 554
16. Aszlányi, K.: Sep vangofrapoj (Tr. romano, 1984) 541
17. Twain, M.: La aventuroj de Huckleberry Finn (Bildrakonto, 1982) 533
18. Benczik, V.: Baza literatura krestomatio (1986, apr.) 531
19. Benedek, E.: Hungaraj fabeloj (1979) 521
20. Baghy, J.: Hura! (Orig. romano, 1986, jun.) 512
21. Krudy, Gy.: La rozo de l' sultano (Tr. fabelo, 1982) 478
22. Heltai, J.: La Morto kaj la kuracisto (Tr. novelo, 1981) 444
23. Nemere, I.: Febro (Orig. romano, 1984) 395
24. Gajdar, A.: Timur kaj lia taĉmento (Tr. romano, 1982) 391
25. Enciklopedio de Esperanto (1986, majo) 388
26. Golden, B.: Marĝene de la lernolibro (Prilingvaj artikoloj, 1982) 382
27. Pechan, A.: Gvidlibro por supera ekzameno (1979) 364
28. Karinthy, F.: Vojaĝo al Faremido — Kapilario (Tr. romanoj, 1980) 327
29-30. Lorjak: Iluzioj (orig. noveloj, 1982) 315
29-30. Nemere, I.: Sur kampo granita (Orig. romano, 1983) 315
31. József, A.: Urboranda nokto (Tr. poemoj, 1986. jun.) 296
32. Kalocsay, K.: Dek prelegoj (Orig. eseoj, 1985) 282
33. Nemere, I.: La blinda birdo (Orig. romano, 1983) 261
34. Gáll, I.: Obsedita de l' Suno (Tr. romano, 1986, jul.) 253
35. Baghy, J.: La verda koro (Romaneto por komencantoj, 1982) 252
36. Petőfi, S.: Johano, la brava (Tr. poemfabelo, 1984) 227
37. Prus, B.: La Faraono (Bildrakonto, 1980) 225
38. Lienhardt, A.: Amuza legolibro en Eo (1984) 224
39. Barcsay, Zs.: Metodiko en la praktiko (1982) 221
40. Dinnyés, J.: Al venko! (Kantaro, 1986, marto) 207
41. Móricz, Zs.: Ĉiela birdo (Tr. rakonto, 1980) 184
42. Tabi, L.: La Damo de l' Fatalo (Tr. teatraĵo, 1985) 182
43. Móricz, Zs.: Malriĉaj homoj (Tr. rakonto, 1979) 178
44. Elem, J.: Betonterapio (Tr. teatraĵo, 1985) 172
45. Blanke, D.: Socipolitikaj aspektoj de la Eo-movado (1986, marto) 167
46. Modest, J.: La ora Pozidono (Orig. rakonto, 1984) 165
47. Móricz, Zs.: Varmega kamparo (Tr. romano, 1985) 156
48. Nemere, I.: Serĉu mian sonĝon (Orig. romano, 1986, dec.) 140
49. Révész, S.: Dilemoj de la nuntempo — vide el Hungario (Tr. studoj, 1984) 123
50. Mészáros, B.: 8-lingva nomaro de Eŭropaj birdoj (1980) 111
51. Kalocsay, K.: Tutmonda Sonoro I-II. (Tr. poemoj, 1981) 99
52. Dudich, E.: Ĉu Vi konas la Teron? (Sciencpopularigo pri geologio, 1983) 91
53. Kemalov, N.: Naŭ jaroj en la infero (Tr. prozo, 1980) 77
54. Urbo Tata (1982) 67
55. Koutny, I.: Perkomputila tekstoprilaborado (1985) 54
56. Hungara Antologio (1983) 53
57. Baranya, la mistera (1985) 46
58. Szilvási, L.: Radioteknika artikolaro (1984) 45
59. Krum, V.: Vilaĝo Brorovo (Tr. romano, 1983) 42
60-61. Frank, H.: Kibernetiko de la homa lingvo, (1986) 33
60-61. Gorov, H.: Ribela kordo (Orig. poemoj, 1983) 33

La n-roj 1, 2 kaj 3 de Sciencaj Komunikaĵoj aperintaj dum 1985, vendiĝis dum la pasinta jaro ĉiuj tri kune en 213 ekz.: pro inventaraj kialoj nun ne eblas apartigi ilin, sed post unu jaro ni jam povos raporti pri la vendorezultoj de la apartaj numeroj.

Ĉu Vi jam havas el la supra listo ĉiujn librojn, kiuj interesas Vin?

recenzoj

Teorioj grimacas

Julio Baghy: Hura! Romano. Dua eldono. Kun postparolo de V. Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio,Budapest,1986. 18,5 cm, 427 p. Bindita. Prezo: 36,- ned. gld.

La libro jam akiris sian sufiĉe altan ,,cenzon", do mi prenas al mi modestan taskon iomete recenzi ĝin, celante plialtigon de la valoro. Malgraŭ lerta kaj eleganta gesto de la aŭtoro per kiu li facilmove pendigis ĉiujn postparolantojn en la aeron. Jen la gesto: ,,Al postparolantoj mi direktas miajn vortojn. Al tiuj, kiuj legas ĉiun verkon de sendependa verkisto tra binoklo de dogmoj, ĉu politikaj, ĉu religiaj aŭ sidante ĉe pupitro de iu difinita literatura skolo sekcias kaj nur sekcias ĝin laŭ la oficiale energistritaj reguloj." Kaj iom poste: ,,Al la tria speco de la legantoj (ĉar ekzistas eĉ triaspecai) mi diras nenion, sed simple pardonos riproĉojn, kalumniojn, malican kritikon, prudecon, plenblovitecon, ĉar — sincere konfesante — mi kruele trompiĝus pri ili, se mia verko trovus ĉe ili — komprenon. Evidente, ke ĝiskole sidante en la ŝlimo de bagatelaj interesoj ili povas kompreni ĉion, escepte homajn doloron kaj revojn, ĉar ili konas nur la literojn, la leksikologian sencon de la vortoj, sed legi — ho, tre domaĝe! — legi ili ne povas." (p. 7 kaj 9)

Nu, la averto impresis min absolute neniel drame, ĉar ankaŭ mi estas ja sendependa legato. Krome estas multe pli plezure akcepti ies ajn mondpercepton ol sekci ĝin anatome. Finfine — ĉu plezuro nepre devas havi sian senpagan aldonon — la utilon? Kaj ĉu ne estas multe pli utile preni la TUTON, se eĉ ĝi ne donas plezuron? Ĝuste la samon proponas la aŭtoro: ,,... flankenmetu la binoklon, forlasu la pupitron..." Nu, traleginte tiamaniere mi jam ne povas reteni riproĉon infane kaprican: ,,Hej! Onklo aŭtoro, vi ja ruze trompis min! Vi promesis rakonti longan-longan historion, sed ĝi rezultis terure mallonga!" Jes ja... malgraŭ sia amplesko — 411 paĝa. La fabelo, la fantazia historio postrestigas impreson de nesufiĉo, samkiel ajna vera plezuro. Pro tiu kurteco ne eblas iamaniere sekci la verkon, ĉar ne eblas sekci ĉefheroon, kiu, cetere, estas imagaĵo, revo, fantazio, grimaco pri la Nova Etiko. La komenca grimaco respeguliĝas en la teksaĵo de la historio kaj ekvidante sin ĝi rezultigas la finon. La analizado signifus frakason de la spegulo por vidi nenion aŭ tiom da pecoj, kiom permesas vidi iu-tiu binoklo, dogmo.

Cetere jam de la komenco, kiam V. Grauer priskribas siajn eksperimentojn kun homidoj, eblas vidi, tra certa binoklo, puran absurdaĵon: kial do bestohomo scias honti, kiam pluraj (homaj) triboj ne scias tion? Sed la vivo, morto kaj testamento de V. Grauer estas nura bildigo de la praa Etiko. Kaj ne la monon testamentas V. Grauer (finfine la mono mankas ja), sed sian mondpercepton. Sian etikon. La etikon de l' bestohomo. Aŭ mankon de la etiko. Nu, estas malfacile trovi ĝustajn vortojn, ĉar ĝis nun dogmuloj disputas, kaj mia ,,etiko de la besto" povas soni en ies oreloj minimume strange. Tamen pli gravas plena malkredo je evoluo de la etiko flanke de V. Grauer. Manifesto de la neado de la ĝenerala evoluo — jen estas langomontra ekgrimaco. La detala priskribo, bildigado laŭ mia sendependa gusto povus esti eĉ pli abomena, timiga ĝis harstarigo — la ĝenro permesas! Des pli, ke sekvas plu vere riĉega miksaĵo konsistanta el la neantoj de la menciita bazo — la homo estas nur besto! Tre abomena, kirlanta, ŝaŭmriĉa supo, kutime nomata la vivo neas la makabran tezon laŭ si mem. Parte oni kredas la nunan etikon taŭga, parte — apenaŭ tolerebla kaj ŝanĝota je pli perfekta. Jen la ideo.

La priskribo, bildigado estas nek satira, nek karikatura, nek speciale drama. Ĉiama, ankaŭ eĉ nuna, majeste prezentita ĝi estas vidata diversmaniere, depende de l' binoklo, ĉu ne? Kutima marĉo de teorioj. Ni diru: konceptoj, skemoj. Ju pli aktuala estas iu-tiu skemo, des pli vivosuke ĝi estas bildigata, kaj ju pli onta, des pli sekskeme aspektas iu-tiu protagonisto. Jen Krak, Jenlafiŝ, du friponoj kaj jen Tamara, Ivan, juna Grauer. Plejparte ĉiu el ili suferas pro la nuna etiko. Finfine, ili ne estas plensataj kaj dormantaj idiotoj, do ilin ĝenas la ekzistanta etiko.

Eĉ bone vivanta homo strebas vivi ankoraŭ pli bone. Sekve, la etiko ne povas ,,stari" surloke. Ĉiuj strebas al nova etiko, proponas sian prospekton. Por savi ne nur sin, sed ankaŭ la tutan homaron. Jen la kerno de l' spektaklo! Ne apartaj aventuroj, agoj, friponaĵoj, sed totala bildo de konkurenco inter la skemoj, konceptoj montras al ni la daŭron de l' grimacado. Mi volonte preterlegus parton de kortegaj intrigoj kaj friponaj ŝteloj por pli kontraste vidi interpruŝon de l' savideoj, skemoj, konceptoj. ,,Hura por nenio!" signifas tiu svarma interpuŝado, ĉar neniu el tiuj konceptoj scias montri veran vojon al tera paradizo. Escepte de tiu skemo, kies nomo estas Tamara. Ŝi kaj iom da pli-malpli prespektivaj skemoj forlasas la ŝliman marĉon de putrantaj teorioj por marŝi rekte al la Nova Etiko. La lasta hele brilas kiel stelo malproksima, tamen atingebla. Do, restas krii ,,Hura!!!" kaj... kaj grimaci. Samkiel en la komenco de la historio. Sed kial do? Laŭ PIV: ,,Grimaco. Vola aŭ nevola streĉo de la vizaĝaj muskoloj, kiu misformas la trajtojn donante al ili neordinaran kaj ofte ridindan aspekton". Kial do grimaci? Ĉu tute nova etiko aspektas ridinde? Aĉe, naŭze, seniluzie? Ĉu la Nova Etiko vere estas nova? Nu, jes, relative..., baldaŭ okazos la 1987-a datreveno de tiu tute ,,nova" etiko.

,,Tamara, mia fratino, de kie vi prenis tiun altenflugan filozofion? Kiu aŭ kio inspiris al vi la vortojn?" — Koŝelev demandas.

,,De kie? La vido de la milfoje krucumita homa boneco,... kiu hodiaŭ preskaŭ senpove baraktas sub la premo de la neracia ekonomia aranĝo de la socio" (p. 410).

Do, sian ,,altenflugan filozofion" Tamara prenis rekte el la buŝo de Jesuo Kristo. El lia programa parolado ĉie konata kiel ,,La prediko sur la monto". Vere ridinde, ĉar ĝuste tiu etiko bazita sur reciproka amo kaj boneco ĝenerala naskis kaj naskas malkredon de V. Grauer kaj ĉiuj aliaj filozofiaj konceptoj, do kompromitis sin kaj sin kompromitas plu. Ĝuste tie finiĝas la verko (finita la grimaco!), ĉar plu eblas nur ripeti senbezone kaj senespere la saman tumultadon por nenio. Bela revo por la nova homa etiko restas por ĉiam nurnura revo, imago. La vojo al ĝi estas barita per la marĉo de teorioj. Escepte de Ivan Koŝelev, kiu ne partoprenis la finan komedion. Li foriras ĝuste por rearanĝi ,,la nerecian ekonomian aranĝon de la socio". Jen estas, skize, mia sendependa kompreno aŭ kungrimaco, ne finita kun tiu de la aŭtoro. Ĉar la verko de Julio Baghy estas ja binoklo, sendependa, sed binoklo. Rigardante tra kiu oni povas daŭre vidi grimacadon de la mondo, tumulton de teorioj, iliaj streĉoj por nenio. Jen maŭismo, jen neofaŝismo, jen salivon perdanta racionalismo, jen ko... topo, ĉu ne sufiĉas?

Viktor Sapoĵniko

recenzoj

Nova „stelo" sur la Esperanta ĉielo

„Al venko!", sonkasedo de la hungara kantisto József Dinnyés, eldonis Lingva Studio Budapeŝt, kaj teksto- kaj notolibro, eldonita de Hungara Esperanto-Asocio.

La hungaroj de jaroj konas József Dinnyés kiel kantiston de nacilingvaj kantoj. Antaŭ nelonge nun tiu Dinnyés esperantistiĝis, almenaŭ kante. En printempo de la pasinta jaro mi havis okazon aŭskulti lian prezentadon dum la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo" en Leipzig (GDR). Sur la scenejo staris mezjarulo, modesta kaj malĝoja pro la teknikaj kondiĉoj kaj luktis kontraŭ netaŭga mikrofono. Sekvatage li denove kantis — nun la tekniko bone funkciis — kaj Dinnyés sorĉis la aŭskultantojn. Granda aplaŭdo de la internacia partoprenantaro de la nomita renkontiĝo estis lia salajro.

Nun mi denove renkontis Dinnyés, helpe de sonkasedo, kiun eldonis Lingva Studio Budapeŝto, kaj aldonita kajero kun tekstoj kaj notoj. Per tiuj mi trankvile povis sekvi liajn kantojn, sen iu bruo de publika surscenigo. Kaj firmiĝis mia tiutempa konstato, ke per Dinnyés surĉieliĝis nova „stelo" de la Esperanta muziko. Kvankam tiu ĉi „stelo" ankoraŭ ne bone kaj sufiĉe regas Esperanton por interparoli — lia prononco kante estas sendube senriproĉa! Li perfektmaniere majstras sian metion. Inter la entute dek ses kantoj, kiuj troveblas sur la kasedo, li tekstis nur kvar, sed verkis la muzikon por ĉiuj. La tradukojn grandparte verkis Imre Szabó. Ĉiujn kantojn, memkompreneble, kantas József Dinnyés, per karakteriza raŭka voĉo. Li eĉ kreis muzikon por konataj Esperanto-poemoj, tiel por la Zamenhofa „Ho, mia kor'" kaj la Baghy-a „La polvohomo meditas". Li ankaŭ ĉerpis el aliaj putoj. Interalie nun „Perlamoto", de la japano Ito Saburo, per komponaĵo de Dinnyés kanteblas — cetere por mi unu el la plej belsonaj kantoj sur ĉi tiu kasedo.

La eldonistoj de la teksto- kaj notolibro, kiel akompanan materialon al la Dinnyés-a kasedo, aldonis Esperantan-hungaran vortaron, kiu enhavas ĉiujn radikojn uzitajn en la kantoj. Estus dezirinde kompletigi tiun ĉi vortoliston per kelkaj aliaj lingvoj.

Ĉu nenia kritiko? Eble ĉi tiu: La titolo de la kasedo „Al venko!", prenita el la poemo samtitola de Julio Baghy, iomete malmodernigas la entutan impreson. „Al venko! Al venko! Al fina glora venk'!" vortumiĝas en ĉi tiu poemo. Ĉu vere al „fina glora venk'!? Kie estas venkinto, ne tre for estas venkito. Esperanto ne intencas venki iujn ajn, eĉ ne aliajn lingvojn. Certe, estas poemo de Baghy — ĉu tial sankta kaj ankoraŭ moderna? Mi dezirus, ke Dinnyés kantu plue modernajn kantojn kaj ne tiom movadajn, verdecajn, kovritajn per la polvo de la Esperanto-historio. La nuna kasedo entenas multajn eksterordinare bonajn ekzemplojn de mi ŝatatajn: „Mi ne timas" (Dinnyés), „Violono savita el fajro" (Zelk), „Estu niaj fortoj" (Dinnyés), „Siberia lulkanto" (Baghy) kaj tiel plu. Jen estu la vojo, sur kiu Dinnyés kante propagandu modernan, nuntempan Esperanton. Ja, li pli kaj pli kantu pri la problemoj de nia mondo, de la homaro. Ni esperantistoj ja estas parto de tiuj mondo kaj homaro. La nunaj problemoj de la tero tial ankaŭ estas la niaj.

Joachim Schulze

Preskaŭ 1500-jara libro en Esperanto-versio

„Konsolo de la Filozofio" de Boecio; eldonis Esperanto-eldonejo „KARDO", Glasgow, en 1984; formato: 143x208 mm; 146 paĝojn; prezo: 3,40 pundoj.

Jen libro, kiun la konsumanto ne povas ellegi kiel krimromanon. En la jaro 523 Boecio (Anicius Manlius Severinus Boethius) skribis ĉi tiun verkon en la latina lingvo. Tiutempe li estis enkarcerigita, akuzita pri ŝtatperfido, atendante la mortpunon. Boecio naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 450 kiel filo de senatana familio en Romo. Estis tiu tempo, en kiu Romo jam ne plu ludis la rolon de forta regno, la imperio estis dividita. Dum la regado de la ostrogota reĝo Teodoriko la filozofo Boecio estis la plej fama klerulo de sia epoko. La libro per 9-paĝa enkonduko pli bone klarigas la diversspecajn koneksojn, ol tion povas fari nun mi.

„Konsolo de la Filozofio" fariĝis la plej legata libro dum la mezepoko. La libro apartenas al la plej ofte tradukitaj verkoj de la Eŭropa literaturo. Eĉ anglaj reĝoj tradukis ĝin, tiel reĝo Alfredo (en la 9-a jarcento) kaj reĝino Elizabeta (en la 16-a jarcento). Nun finfine ankaŭ la Esperanto-komunumo posedas tradukaĵon de tiu klasikaĵo. D-ro Albert Goodheir, kiu ellatinigis la libron, faris majstran traduklaboron! Senriproĉa rezulto! Denove pruviĝis, kion esperantistoj jam dekomence scias, ke la Lingvo Internacia plej bone taŭgas por traduki ankaŭ nefacilajn verkojn.

La libro mem konsistas el entute kvin unuopaj libroj. Konstante alternas ĉapitroj prozaj kun kantoj poeziaj, dum kiuj la aŭtoro interparoligas la Filozofion kun li. Citaĵo el la enkonduka parto: „La pensado de la 'Konsolo' estas ĉefe neoplatona. Plotino, Porfirio kaj Proklo (Proclus) alparolas nin kaj ofte Platono mem". Platono, helena filozofo, disĉiplo de Sokrato kaj majstro de Aristotelo. La leganto do troviĝas meze de la klasikaj filozofoj. Kiel dirite: ne estas facile legebla libro, oni ja bezonas tempon por intense ĝui la legadon. D-ro Goodheir aldonis notojn fine de la libro, kiuj helpas kompreni interligitecojn. Per tio la libro ankaŭ estas komprenebla por mezkleruloj.

Mankas al mi la komparo kun la origina verko, tamen mi certas, ke la „Konsolo de la Filozofio" spegulas la esencon de la latina eldono. Precipe la kantotekstoj, ŝajne simple tradukitaj, trovu nian rekonon. Ekzemplon ni tiru el la tria libro, kanto XI:

„Se iu profundmense serĉas la veron
Kaj vojon nealcelan volas eviti,
En sin rigardu li per interna lumo
Kaj cirkle fleksu vaste vagantajn pensojn,
Li gvidu sian menson, serĉantan veron
Ne fore, sed en propra trezoro trovi".

Tiuj linioj ankaŭ en la hodiaŭo validas. Jam pro tio estas la eldonaĵo salutinda — kial ne lerni de niaj prauloj?

Joachim Schulze

GAJA PAĜO



„Ora virbovo"

nomiĝis la hotelo de iliaj nuptaj plezuroj. Poste, hejme, ŝi ridokule rememoris antaŭ la edzo:

— Kiaj feliĉaj tagoj! Sed mi konvinkiĝis, karulo: ne pri vi ricevis sian nomon la hotelo!

Post vojaĝo

— Kredu aŭ ne, sed en Londono mi spertis tian nebulegon, ke eĉ miajn ŝuojn mi ne vidis...

— Nenio! Mi feriis en urbo, kie eĉ miajn manojn mi ne vidis pro la densega nebulo!

— Strange! En kiu urbo?

— Tion ne eblis ekscii, ĉar kovris ĉion terura nebulo...

Poste...

La juna edzo trovas sian edzineton larmanta. Li konsterniĝas:

— Trezoreto, kio afliktis vin?

— Mi reiros al panjo...

— Sed kial do?

— Ĉar min ege nervozigas ĉi tie la malordo... Kaj al mi tute ne plaĉas la gusto de miaj kuiraĵoj!

Aliflanke

La lernantoj ricevis la taskon skribi pri la temo: „Mia patro".

Jen iu el la skribaĵoj: „Mia paĉjo fortas kiel leono, traveturas la maron per sola boateto, li kapablas fari ĉion ajn. Tamen li devas ofte lavi la manĝilaron kaj elporti la forĵetaĵojn."

Kaj la filino

— Vi certe multe helpas al via panjo, ĉu?

— Kompreneble, ĉiam.

— Brave! Kaj kiel?

— Nu, mi rapide iras dormi, por ne ĝeni panjon post la vespermanĝo.

Kaj la onklo

Grandventra dikulo staradas antaŭ la infanvartejo.

— Ĉu vi atendas infanon? — demandas lin la afabla vartistino.

— Kion vi pensas? — li respondas kolere. — Mi ĉiam aspektas tiel!

Povas okazi

— Kara avinjo, mi jam pli facile veturos de nun, ĉar somere mi bonŝance ekkonis Esperanton!

— Bone, nepinjo, sed atentu ke li ne ŝoforu tro aŭdace sian aŭton!

Ankaŭ tio...

— Ej, ej, mia kara! — balancas Petro sian kapon — ĉu tio estas supo aŭ eble vazlavaĵo?

— Ĉu vi ne povas distingi? — koleras la edzinjo.

— Ne...

— Tiam la diferenco tute ne gravas por vi!

Sed denove ne...

Ekscitite telefonas sinjoro Kameno al la redaktoro de la loka gazeto:

— Sinjoro, mia edzino ĵus ricevis tri ĝemelojn, Kamenidojn!

— Kurioze! Tri kamelojn? — miregas la redaktoro. — Ĉu vi bonvolos ripeti?

— Neniokaze, sinjoro!

Tro strange?

— Do vi jam konsumis du edzojn, sinjorino?

— Jes, kaj senhezite mi eksedziniĝis, kiam mi ne toleris plu...

— Grandioze! Mi proponas, estu baldaŭ mia eksedzinjo! Ĉu bone?

Antaŭ la nuptovojaĝo

— Karlo mia, vi devos sola vojaĝi al Venecio!

— Sola fari nuptovojaĝon? Kion vi pensas, karulinjo?

— Diru do: ĉu ĝuste tiam ni devas nupti en Venecio, kiam komenciĝas nova serio de kriminalfilmoj en la televido?

Ervin Fenyvesi

Esperanto-revuoj

iam kaj nun aperantaj kaŝiĝas en la ĉefaj linioj: H.1., H.10., H.65., V.1., V.13., kaj V.47. — ensendendaj. Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.
Limdatoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

HORIZONTALE: 1. „La gazeto kiu instruas kaj amuzas", fondita de Andreo Ĉeh, 10. Beletra revuo el Svedio, redaktis ĝin F. Szilágyi., 12. La plej alta perfekteco, 13. Oni devas peni ne renkonti ĝin (sen finaĵo), 14. Frandaĵo, 15. Reen: prepozicio, 16. Reen: parto de teatraĵo, 17. Scienca prefikso: „interne de", 18. Sovaĝa porko, 20. ...-oj: la plej granda Eŭropa montaro. 21. ...de Janeiro, 22. Glaciige malvarme, 24. Valora metal', 25. Verba finaĵo, 26. Vortfiguro (R), 27. Komenco de origo (!), 29. Trovebla en H.14., 31. Reen: tiea, 33. Multas, 34. Sufikso por individuo, 35. ...de Esperanto: estis lernolibro por rusoj, 38. Kora inklin', 39. Saltanta besteto, 40. Kvar sezonoj konsistigas, 41. Piedvesto, 43. Mezurunuo de elektra rezistanco, 45. Ŝtato en Suda Ameriko (R), 46. Molibdeno, 47. Mezo de kometo!, 50. Parto de fiziko, pri lumaj fenomenoj, 52. Nigeria popolo, 53. Frakcio, 55. Vazo, 56. Entjero, ne produto de aliaj entjeroj (R), 57. Senmakula, 59. Reen: tabelvorto, 60. Larĝa fiŝreto (aŭ mita Skandinavia egulo), 61. Malgranda teatraĵo, 63. Tre malmola ŝton', 64. Infanmanĝanta grandegulo, 65. E-revuo por lernejanoj el Hungario.
VERTIKALE: 1. La revuo, ĉirkaŭ kiu elformiĝis la Budapeŝta Skolo, 2. Diaĵo de la vira beleco en Mediteraneo, 3. Malgajno, 4. Ronĝulo pli granda ol muso, 5. Ĉiu ekstrema flanko, 6. Reen: numeralo, 7. Varia (R), 8. Komenco de demandaj pronomoj, 9. ...manoj (osmanoj), 10. Kiel H.57., 11. Frato de la patro, 13. La plej luksa Esperanto-revuo, 18. Koncernaj certan movon en ŝakludo, 19. Kiel V.9., 22. Alparolo al germana sinjorino, 23. Deflankiĝi de la vero (R), 28. Dekono de germana marko (R), 30. Skandinavia praa litero, 32. Ĝenro de poezio, 36. Vorto por distingigi iun, 37. Okazas en akvo, je 100 gradoj, 42. Ronda kaveto meze de la ventro (R), 44. Parto de kopulo!, 47. Revuo el Japanio, 49.

I.Z.



Solvoj de la krucenigmo en la n-ro 1986/4:

De kiam foriĝis la nia pronomo,
via, mia naskis multe da malbono.

La vespero

(M. Csokonai Vitéz — trad. M. Fejes)

Premion gajnis per lotumado: Imre JÁMBOR, Oradea, R; s-ino NAGY Lászlóné, Budapeŝto, H; s-ro YAMAGUTI Mitio, Suwa-si, J.

Premion gajnis per lotumado: Aleksandr GRIŜĈENKO, Voroŝilovgrad, Ukrainio, SU; d-ro Otto KACZINSKI, HAVELBERG, GDR.
La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:
1987/3: „Mariagnes", romano de Lorjak; 1987/4: Baza Legolibro por Komencantoj; 1987/5: „Serĉu mian sonĝon" de István Nemere.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Márton Fejes
OBSEDITA DE L' SUNO
de
István Gáll

Tiu ĉi modernforma romano rakontas la vivon de hungara virino inter la jaroj 1944-1970, kaj arte prezentas ankaŭ la historiajn kaj sociajn okazintaĵojn en tiu periodo.

1. Al kiu dediĉis la romanon la aŭtoro?
2. Kiel nomis la domanoj la protagonistinon en ŝia infanaĝo?
3. Kio estis la moknomo de la kafejo Samovaro?

Limdato: du monatoj post la apero de tiu ĉi numero.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1986/4:

1. Joĉjo havas ses jarojn.
2. S-ro Prezidento venis el Venderdik-lando.
3. Andrzej Pettyn esperantigis la rakonton.

HAVINDA KANTARO

József Dinnyés: AL VENKO! 16 kantoj kun muziknotoj. Librofine suplemento kun Esperanta-hungara vortareto, enhavanta ĉiujn vortojn de la kantoj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1986. 21 cm, 24 p. Prezo: 6,- ned. gld. (Por Hungario: 18,- Ft)

Korespondi deziras

E-societo LEONO apud Pasarĝik aranĝos en majo letervesperon por festi sian fondkunvenon antaŭ 20 jaroj. Bonvolaj E-aĵoj kaj salut-bk estos certe responditaj: prez. Jordan NIKOLOV, BG-4468, MOMINA KLISURA. Samadrese koresp. membroj: lektorino Veneta ĤRISTOVA (30) instruistino — f-ino Maria St. NENOVA (35) partia sekretariin o — f-ino Angelina A. VALJOVA 925) kemiistino — geedzoj Iliana, Jordan NIKOLOV (37, 46) oficistoj — s-ino Liljana Bl. Marinkova (47) vilaĝestro — elektristo Borislav G. Marinkov (24) — s-ino Boĵana Kr. PAVLOVA (56) instruistino em. — oficistino Stoilka D. DunEVA (35) f-ino Rosica DIMITROVA (24) entreprena sekretariino — Eŭgenia J. NIKOLOVA (11) lernantino, kaj pluraj aliaj. Studento Rafal FRACKOWIAK (22) int. pri turismo, muziko, ĵurnalismo, sporto. KOŠCIAN Korczaka 10,- PL-64-000. — S-ro Umid RAĤMATULIN ktm. pĉt, resp. gar. SAMARKAND, Glavp. p.k. 10. — S-ro Viktor KUDRAVCEV (29) pĉt, int. pm, bk pri urboj, tramoj. SVERDLOVSK Uralskaja 10-51, SU-620.067. — Henryk Kosinski (56) emer. kun edzino Maria (39) instruistino kaj filo Wojciech (14) lernanto (int. elektroniko) prefere kun hungara familio, aŭ unuope kun s-anoj. ZABRZE ul. De Gaulle 122/9, PL-41-800. — Medicinisto Sergej DEREVJANNIĤ (21) pĉt, event. ankaŭ A, G, F, P, Hungare kaj Bulgare. UFA prosp. Oktabrja 176/1-145. SU-450.055. — Geedzoj Jan Boleslaw FABISLAK, Ĵurnalisto kaj instruistino, kun geedzoj pri familia vivo k.a. LASK, ul. Polna 17 m3, PL-98-100. — Studento Krzysztof DOBERSZTYN (23) pri vojaĝoj, muziko, filatelio, lingvoj. DAMASLAWEK, ul. Grunwaldzka 15, PL-62-110. — Juna ĉino Rid-kosmo ZHANG (26) dancisto, pri muziko, artoj, literaturo, nacikutimoj, turismo, kol. kalendaretoj, magazinoj, E-aĵoj, nepre resp. Shi Gé Wú tuán, urbo Neijiang, 641.000 P.R. Ĉinio. —

Unua komuniko por la INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO ESPERANTO 100-JARA UNIVERSITATO DE VIENO 1987. 10. 28 — 30.

La patronadon transprenis:
la federacia ministro d-ro Heinz Fischer
la federacia ministro d-ro Herbert Moritz
la urbestro de la urbo Vieno d-ro Helmut Zilk
la direktorino de la Aŭstria Nacia biblioteko d-ro Magda Strebl
la rektoro de la Universitato de Vieno univ. prof. d-ro W. Holczabek
la Centro de Esploro kaj Dokumentado de la Universala Esperanto-Asocio
la Akademio Internacia de Sciencoj San Marino

Tiu simpozio organiziĝas far la Aŭstria Laborkomitato 'Esperanto 100 jara' en kunlaboro kun la Lingvistika Instituto de la Universitato de Vieno, la Wiener Sprachgesellschaft kaj la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (Aŭstria Nacia Biblioteko) kaj okazos en la Universitato de Vieno. Parolos internaciaj scienculoj de diversaj sciencobranĉoj pri la fenomeno Esperanto, ĝiaj lingvistikaj, historiaj, pedagogiaj, informatikaj, literaturaj k.a. aspektoj. Diskutlingvoj: Esperanto kaj la germana.

Antaŭvidita aliĝkotizo: 500,- AS (aŭstraj ŝilingoj), por studentoj 200 AS.

Se vi volas partopreni aŭ ricevi pluajn informojn, bv. skribi al la Aŭstria Laborkomitato 'Esperanto 100 jara', Postfach 92, A-1183 WIEN, Aŭstrio.

Leterkesto

Ester KEIL, Nürnberg, FRG: La dudeko da paĝoj en la ilustrita modesta broŝuro RERIGARDO de via E-grupo (la unua en la mondo) ĉarmis nin per la individuaj tonoj de la kontribuaĵoj, raportoj precipe pri la UK en Aŭgsburgo. Estis inde ekkoni la personajn travivaĵojn de viaj grupanoj, la spertojn dum la aktivadoj en la kongreso, kaj aliloke, vizitantaj la vastan, kvankam ne dense loĝatan Esperantujon. Ni konsentas: estus konsilinde — precipe por kongres-aktivuloj — priskribi en same klara stilo kaj distra maniero siajn agadojn por niaj historiistoj, eĉ por niaj „sociologoj". Akceptu dankojn kaj gratulojn pro la brava agado!

Vjaĉeslav HROMOV, Keila, Estonio, SU: Ankaŭ ni havas nenian dubon pri la graveco de bona faterminaro pri la sporta lingvo. Tiucele multe laboris nia iama redakciano, Tibor Újlaky-Nagy, kiu eldonis eĉ „prov-volumon", kvazaŭ enciklopedieton, pritraktantan la sport-terminojn kaj esprimojn (1972). Lian laboron nuntempe revizias kaj grave disvolvas d-ro Árpád Máthé; tion necesigas ankaŭ la plej modernaj evoluoj de la sportoj. Eventuale tiu eldonaĵo aperos en la Jubilea Jaro. Koncerne la novan grandan vortaron H-E ni povas informi, ke tiu, ĝis nun la plej ampleksa, dulingva E-vortaro (pli ol 50 mil kapvortoj) troviĝas jam en „maturiĝanta" stadio, kaj verŝajne dum la jaro 1988 ĝi atingos la publikon. La ĉefredaktoro estas prof. István Szerdahelyi.

Marie JAKOBSONS, Riga, Latvio, SU: Ankaŭ nome de Nemere ni dankas vin pro la alsendita paĝo de „Literaturo kaj Arto", kiu publikigis noveletojn de nia populara verkisto. Precipe plaĉis, ke la enkonduko de Nora Brice kaptas la okazon por informi la publikon pri la jubileo kaj la originala literaturo de Eo. La tradukinto Guntars Brális trafe elektis ĉarmajn pecojn de Nemere. Ankoraŭfoje dankon!

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 141-078, 334-194. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca aldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704.
MESz nyomda 87-0017

PANNONIA
HOTELS & RESTAURANTS

*Via hejmo en Hungario

Multaj diras pri Budapeŝto, ke ĝi estas la perlo de Danubo. Tio tute ne estas troigo, ja pro sia situo ĝi havas vere unikan panoramon. Budapeŝton trairas Danubo: sur ĝia dekstra flanko troviĝas la montoplena Buda, sur la maldekstra Pest, konstruiĝinta sur ebenaĵo. Budapeŝto naskiĝis per la unuiĝo de tri urboj — Buda, Pest kaj Óbuda — en la jaro 1873, kaj ĉe la jarcentturniĝo komenciĝis ĝia intensa evoluo. Tiutempe estis konstruitaj ambaŭflanke de la bulvardoj kaj avenuoj tiuj unike belaj palacoj kaj ludomoj, kiuj ĝis nun regas la urban panoramon. Tiam konstruiĝas la Operejo, kies teknikaj instalaĵoj estis tiutempe la pinto de la monda teatra tekniko; sur la bordo de Danubo estis konstruita la Parlamentejo, kiu fariĝis la simbolo de nia konstitucia vivo; tiam estis kreita la monumento omaĝe al la miljara datreveno de la patrujokupo, kies statuogrupoj ankaŭ nun memorigas nin pri la historia heredaĵo de nia miljara pasinteco. Senfine ni povus denombri la vidindaĵojn, sed estas pli konsilinde dungi fakspertan ĉiĉeronon, kaj per lia gvidado konatiĝi — jam persone — kun la miraklaĵoj de Budapeŝto. Dungi ĉiĉeronon oni povas en la oficejoj de Pannónia Tourist Service, aŭ en la hoteloj de Pannónia, kie la servo por klientoj organizas ankaŭ urbajn ekskursojn.

PANNONIA
TOURIST SERVICE

Budapest
VIII., Rákóczi út 9.
Tel.: 141-886, 141-820

Budapest
V., Kigyó u. 4-6.
Tel.: 183-910, 183-658

ĈE LA OKCIDENTA PORDO DE HUNGARIO KORE SALUTAS KAJ BONVENIGAS VIN LA DOMMASTRO DE LA DEPARTEMENTO GYŐR-SOPRON:

ciklámen tourist

BELEGAJ MALNOVAJ ARKITEKTURAJ KREAĴOJ. UNIKAJ NATURBELAĴOJ. FAMA GASTRONOMIO.







VIZITU NIN, ESTU NIA GASTO!

El la sekvaj numeroj de „HUNGARA VIVO" Vi povos ĉerpi pli detalajn informojn pri la vidindaĵoj de nia departemento. Petu nian Esperantlingvan prospekton ce la sekva adreso:

CIKLAMEN TOURIST
H-9023 GYÖR. JÓKAI U. 12.
☎ 36/96-16-050.
Tx: 24-616